

1977 januaro

70-a jaro

n-ro 853 (1)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando

La prezidanto
de Islando
— alta
protektanto
de la 62a UK



Vi trovos

varmkoloran aldonon sur tiuj paĝoj de la numero, kie la nunaj prestekniko kaj prezo ebligas uzi koloron. Vi eble ne konscias pri etaj redakciaj ludoj kaj "superstiĉoj" kiam venas la momento de la kolorelekto. Rerigardu iom la antaŭajn jarkolektojn kaj vi facile konstatos, ke la koloroj ja ludas ian rolon. Kiel en la lastaj du jaroj, ni do kredis, ke estas konvene inaŭguri ankaŭ ĉi tiun jarkolekton per gaja, varma, serena kaj optimisma koloro. Tiu koloro simbolu ankaŭ varmajn bondezirojn de ni kiuj produktas la revuon (kunlaborantoj, kompostistoj, enpaĝiganto, fotografo, presisto, leganto de presprovaĵoj, redaktoro) por ĉiu unuopa el niaj dek mil legantoj aŭ foliumantoj de la revuo. Prospera jaro 1977 respeguliĝu ankaŭ en unu enhavriĉa jarkolekto!

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio: Ĉu antaŭ la decida jardeko? (Humphrey Tonkin)
- 2 "Stafeto" translokiĝas al Danlando: Régulo kaj Kehlet kune, Groningen / Tampere
- 3 Informoj de CED: De LMLP al LPLP: Nova vesto por la faka revuo (Jonathan Pool)
- 4 Lingva Servo de UEA: Helpe je dispono
- 5 Semajno de Internacia Amikeco — inter la 20a kaj 26a de februaro: Amikeco kaj la Movado (sm), Ĝustiga letero: Kiu ĉefrolis? (V. Peevski)
- 6 Seminario "Lingva demokrateco": Lingva problemo — novaj trajtoj (Renato Corsetti)
- 8 Konferenco en Paderborn: Paderborn estas fenomeno (sm)
- 9 Fakaj asocioj: Skolta kampanjo (J.H. Hammer), Lerneja bulteno (Germain Pirlot)
- 10 Plia UN-dokumento en Esperanto (Deklaracio pri la Donado de Sendependeco al Koloniaj Landoj kaj Popoloj)
- 11 Leterkesto
- 12 Recenzoj ("Doutor Esperanto", "Esperanto sem preconceitos", "Mozaiko Tokio", "Fundamentoj de psikologio")
- 13 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 14 TEJO-paĝo: Parizo post Poitiers, Laborbrigado, Laponoj k.a., La centa HEJS
- 15 Kongresa komuniko: Novajoj pri la 62a Universala Kongreso en Islando
- 16 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 17 Nekrologoj (M. Clavel, A. Gitzinger, A. Koós, C.W. Roberts, J. Viladoms Valls)
- 18 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de UEA, Anoncoj
- 19 Ekzameno E (Bernard Golden), Anoncetoj
- 20 Anonco

La kovrilo

La Prezidanto de Islando, s-ro Kristján Eldjárn (foto de Mats Wibe Lund, filo), akceptis esti la Alta Protektanto de la 62a Universala Kongreso de Esperanto en 1977, en la islanda ĉefurbo Rejkjaviko. Antaŭ sia elekto por la nuna funkcio (en 1968), la islanda ŝtatestro postenis kiel arkivisto de Islando. Havi ŝtatestron kiel altan protektanton ne estas malofta honoro por la Universalaj Kongresoj. En Islando, tamen, tio povus havi tute specifan aromon, ĉar la 62an UK protektas la prezidanto de unu el tiuj landoj, kiuj pleje konscias ankaŭ pri la lingva dimensio de sia identeco kaj tial flegas ĝin kun malofte renkontataj atentemo kaj ĵaluzo. La prezidanto havas siajn meritojn pri tio.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1881-1910). Legantoj en 86 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo por unu kalendara jaro: 30,00 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Anonctarifo por ne-Esperantaj komercaj entreprenoj estas duobla. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanio; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de UEA-agado: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, Poŝtfako 901, PL-30-960 Krakow 1, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

Ĉu antaŭ la decida jardeko?

LA PASINTAJ DU-TRI JAROJ instruis al ni multajn lecionojn. El ili, la plej klara estas la rimarkinda stabileco kaj interna forteco de la Esperanto-movado. Se necesus ankoraŭ pruvi tion, oni povus konstati, ke la Internacia Lingvo fariĝis neevitebla kaj nedetruibla fakto de nia epoko. La kulturo kaj socio de Esperanto estas firma elemento en la nuntempa internacia vivo.

Tio estas pli ol klara en la situacio de UEA mem. Tra ĉiuj perturboj de la ĵus pasintaj jaroj, tra ĉiuj krizoj financaj kaj organizaj, UEA tenis la flagon alta kaj laboris diligente por konservi malnovajn gajnojn kaj prepari la grundon por novaj.

Nun ni komencas rikolti la rezultojn de tiu eksterordinara diligento — kaj ankaŭ lojalo — de nia centra stabo kaj nia membraro. En 1975 ni sukcesis registri pozitivan saldon post kelkjaraj deficitaj en niaj financoj. Feliĉe, ni povas anonci similan rezulton en 1976. Kvankam la finkalkulo ankoraŭ ne estas preta, estas jam nun informebla, ke ankaŭ 1976 estos jaro de financa pluso. Tiu restarigo de la financa stabileco havis siajn konsekvencojn ankaŭ ĉe la membronombro: post kelkaj jaroj da perdo, en 1976 ni registris malgrandan gajnon en la nombro de individuaj membroj.



La junularo venas: Ĉu la nombro de la partoprenintoj en la TEJO-kongreso en Tesaloniko aŭguras novajn fortojn?

Se oni aldonas al tio la aliĝon de kelkaj novaj landaj asocioj kaj la signifan plivastigon de la kolektiva abonado de la revuo, oni tuj ricevas bildon de asocio pli sekura, pli forta kaj pli laborpreta ol ni vidis jam de pluraj jaroj.

Dum la venontaj monatoj venos ankaŭ pliaj ŝanĝoj, interalie en reorganizado kaj plifortigo de la Centra Oficejo kaj rilataj instancoj. Dum la pasintaj du jaroj ni jam faris kelkajn paŝojn tiudirekten, precipe per fondiĝo de la Volontula Servo. Ni povas antaŭvidi la formalan starigon de nova, aparta fako pri informado kaj esplorado dum la venontaj monatoj, la eldonon de nova librolisto kaj aliajn elpaŝojn de la Libroservo, kaj signifajn rezultojn de la laboro de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, kies plifortigita kaj modernigita revuo komencos aperi sub nova vesto ekde la Nova Jaro.

Tiu eksvingo de agado ĉe UEA stimulas kaj spegulas rimarkindan plivigliĝon sur aliaj terenoj en kaj ekster la Asocio. La eldona agado, precipe pro signifaj kontribuoj el Britujo, Danlando kaj Japanujo, montras refortiĝon kaj novan vervon. Niaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj denove allogas la esperantistojn en kreskantaj nombroj. La kuraĝigaj aliĝociferoj por Rejkjaviko estas nur unu atesto pri tio — kaj la impona nombro da aliĝintoj al la pasintjara TEJO-kongreso memorigas nin, ke precipe la junularo montras novajn fortojn. Ankaŭ la kampo de fakula interesiĝo pri Esperanto konstante firmiĝas — ne nur en Paderborn aŭ Budapeŝto aŭ La Chaux-de-Fonds sed ankaŭ en novaj lokoj kaj ĉe novaj homoj.

Estas bela periodo por labori por Esperanto. Kvankam la publiko restas skeptika, fermita en la propraj interesoj, ema al la propra prospero — iom post iom, malrapide sed senteble, ni lernas kiel alpaŝi ĝin kaj kiel disciplini nin mem en la intereso de la pli granda idealo. Ĉefe ni ankoraŭ devas lerni kiel konvinki la publikon pri la graveco de la lingva demando — pri la danĝeroj de lingva superregado kaj lingva diskriminacio, pri la kostoj de lingva diverseco, pri la neceso de tutmonda komunikilo — kaj en tiun kuntekston injekti la ideon de la Internacia Lingvo Esperanto, sola praktika solvo de la tutmonda lingva problemo. Por atingi tion, necesas rapide kaj decide plifortigi precipe nian informadon kaj niajn eksterajn rilatojn ĝenerale. Necessas ankaŭ daŭrigi la utiligon de la Volontula Servo, kaj persvadi al niaj membroj dediĉi sin intense al Esperanto pere de tiu servo dum periodoj de ses monatoj, naŭ monatoj, unu jaro.

Aparte gravas, ke niaj aktivuloj, kaj tiuj kiuj ŝatus fariĝi aktivaj, venu al la 62a Universala Kongreso de

Esperanto en Rejkjaviko. Islando ne estas nur interesa kaj unika lando (kiu meritas viziton eĉ nur pro tio), sed ĝi estos ankaŭ la loko kie ni fiksos nian agadon por la venontaj jaroj, elektos novan Estraron kaj pri diskutos demandojn signifajn, precipe por la eksteraj rilatoj kaj estonta sukcesigo de Esperanto.

La jaro 1977 portos nin al punkto nur dek jarojn for de la unua jarcento de la Internacia Lingvo. Ĉu tiu dekjara periodo kondukos nin al la sojlo de sukcesigo de la heredaĵo de Zamenhof? Tio dependos grandparte de nia kapablo je sagaco, sindediĉo kaj efika laboro. La jaro 1977, la komenca punkto de tiu eventuale decida jardeko, alportu diligenton kaj laboron, sagacon kaj klarvidon, feliĉon kaj finan sukceson al ĉiuj laborantoj por la Internacia Lingvo. Nome de la Estraro de UEA kaj ĉiuj aliaj aktivuloj en ties organiza strukturo, mi deziras al vi pacan kaj prosperan jaron 1977.

Humphrey Tonkin


"STAFETO" TRANSLOKIĜAS AL DANLANDO:

Régulo kaj Kehlet kune

La ĉi-suba komuniko rezultis el lastatempa traktado, kiu inkluzivis ankaŭ viziton de s-ro Kehlet al la eldonisto J. Régulo en Kanariaj Insuloj. La teknika integriĝo de la du prestiĝaj eldonejoj estas aparte salutinda ankaŭ pro la fakto, ke tio garantias revenon al la nivelo de la Esperanto-eldonaĵoj, kiun dum la postmilitaj jaroj pleje altigis ĝuste la eldonejo Stafeto kaj parte ankaŭ TK. Tio per si mem forigos la lastatempnan rean svarmon de diversaj broŝuroj, kiuj, kvankam multekostaj, estas lingve kaj teknike malindaj al la nuna stato de la Esperanta kulturo.

LA PLEJ GRAVA Esperanto-eldonejo dum la lastaj 25 jaroj, STAFETO, fondita en 1952 kaj eldoninta preskaŭ 90 titolojn, nun translokiĝas al Danlando. La fondinto de STAFETO Juan Régulo kaj la antaŭa posedanto de la Eldonejo TK Torben Kehlet decidis unuigi siajn fortojn por ebligi eldonon de altkvalitaj literaturaj verkoj ankaŭ en la estonteco.

Unu el la interesaj vojoj, kiu per tiu paŝo ebligis, estas perkomputila kompostado. Tio solvas la problemon de la specialaj Esperantaj supersignoj kaj ankaŭ ne postulas, ke la kompostistoj sciu Esperanton. La komputilo tutsimple "legas" rekte de la maŝinskribitaj paĝoj. La unua libro kiu aperas laŭ tiu sistemo estas *Metropoliten* de V. Varankin, originala romano 256-paĝa (v. en nia revuo, decembro 1976, p. 209). Alia



La eldonisto Juan Régulo kaj lia domo en Kanariaj Insuloj: Giganta kontribuo al la Esperanta kulturo.

libro baldaŭ aperonta sub la komuna eldonista nomo STAFETO—TK estas ankaŭ la originala romano *La granda kaldrono* de John Francis. Tiu libro, kompostita jam antaŭ du jaroj, havas pli ol 600 paĝojn kaj aperos en 1977.

Pro la praktikaj laboroj ligitaj al la translokiĝo, ni devas kun bedaŭro anonci, ke la ekspedo de iuj ajn STAFETO-libroj devas esti prokrastita ĝis la mezo de 1977. Ni tre pardonpetas pro tio, sed la amaso da presitaj paĝoj, ankoraŭ ne binditaj, ampleksas ĉ. 30 tunojn! Ili en marto estos transportitaj en 2 kontenoroj de Kanariaj Insuloj al Danlando, sed unue faros etan viziton en Sudameriko! (La ŝipoj de Danlando uzas la havenon de Santa Cruz nur je foriro de Eŭropo).

La ekspedadresoj de STAFETO verŝajne fariĝos la Esperanto-Centro en Aarhus, Danlando, kaj la Libro-servo de UEA; la korespondadreso estas tiu de : Torben Kehlet, Kildeaasen 22, DK-2840 Holte, Danlando.

Groningen

EN LA KONKURSO pri varbado de novaj individuaj membroj de UEA (anoncita en nia revuo de junio kaj novembro 1975) venkis **Groningena Esperanto-Grupo**, Nederlando (tria premio de 100,00 gld.) kaj "Antaŭen" — **Esperanto-Societo de Tampere**, Finnlando (kvara premio de 50,00 gld.). Tiel decidis la Komisiono pri Financo kaj Administrado, kiu en unu el siaj lastatempaj kunsidoj traktis la rezultojn de la konkurso. Kiel ni jam anoncis, la monpremiojn por la konkurso disponigis Internacia Esperanto-Instituto, Hago, Nederlando. Tre verŝajne la konkurso ripetigos kun iom ŝanĝitaj kondiĉoj, pri kio vi legos en unu el niaj postaj numeroj.

Tampere

De LMLP al LPLP: Nova vesto por la faka revuo

JAM DE 1969, Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) kontribuas al la scienca pritraktado de lingvaj problemoj per la internacia fakrevuo *La monda lingvo-problemo*.

Aperante ĉe Mouton, la tutmonde gvida eldonejo en la fako lingvistiko, nia revuo provizas al sciencistoj la unikan eblecon publikigi studojn pri lingvaj bariloj tra la mondo. Kial tiu ebleco estas unika? Unue, ĉar *LMLP* estas la sola internacia revuo, kies temo estas la praktikaj problemoj rilataj al lingvo kiel socia fenomeno. Aliaj revuoj, malsame, aperigas ĉefe teoriajn studojn aŭ limigas sin al unuspecaj problemoj (ekzemple tradukado aŭ lingvo-instruado). Due, *LMLP* estas unika, ĉar ĝi estas, laŭ nia scio, lingve la plej sendiskriminacia revuo en la mondo. Ĝi permesas al aŭtoroj, verki en la propra lingvo, kaj neŭtrale resumas ĉiun artikolon en Esperanto, dum preskaŭ ĉiuj ceteraj fakrevuoj, inkluzive de la t.n. "internaciaj", havas tri, du aŭ (kutime) nur unu oficialan lingvon. Trie, *LMLP* celas ne nur komunikadon inter samfakanoj, sed ankaŭ facilan havigon de fakaj scioj pri lingvaj problemoj al homoj, kiuj forte sed ne profesie interesiĝas pri lingvaj aferoj.

Evidente, ĉiu esperantisto interesiĝas pri lingvaj baroj kaj pri la ebleco solvi la problemon de lingva diverseco. *LMLP* portas al la Esperanto-movado la konindajn kaj uzindajn fruktojn de lastatempaj esploroj tra la mondo. Moderna laborado en la medio de Esperanto postulas ne nur bonajn ideojn, sed ankaŭ ĝisdatajn sciojn. Okupiĝante pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, oni devas scii ion pri la problemoj de lingvo-instruado ĝenerale. Simile utilaj — eĉ nepraj — en la respektivaj medioj estas scioj pri lingvaj antaŭjuĝoj, lingvaj leĝoj, lingvo-konduto inter la diplomataro, la evoluigo de terminaroj, la influo de la lingvo al la kulturo ktp. *LMLP* donas tiajn sciojn, en komprenebla formo, al esperantistoj kaj aliaj, kiuj bezonas ilin.

Ekde 1977, pli precize ekde volumo 7, *LMLP* daŭrigos sian ekziston sub nova nomo: *LINGVAJ PROBLEMOJ KAJ LINGVO-PLANADO*. La titolo, krom en Esperanto, aperos sur la kovrilo en pluraj naciaj lingvoj. Preparante tiun novan veston, la redaktoro, prof. Richard E. Wood, jam komencis inviti novajn fakulojn al membreco en la Redakta Komitato, kun la celo plivastigi la komitaton al kelkdeko da anoj.

Tiuj ŝanĝoj sekvas longan diskutadon pri la situacio de la revuo, i.a. dum la Universala Kongreso en Ateno. CED konstatis, ke la revuo sukcesis ricevi kaj publikigi

manuskriptojn de plej elstaraj sciencistoj. Artikoloj aperintaj en *LMLP* estas poste plurfoje menciitaj en aliaj studoj aŭ eĉ represitaj en libroj. Iom post iom, la revuo gajnas lokon en la konscio de la scienca mondo. Aliflanke, ni konstatis, ke la abonantaro ĉesis kreski kaj ekmalkreskis. La prestiĝo de aliaj periodaĵoj altiĝis pli rapide ol tiu de la nia. La nombro de abonantaj bibliotekoj restas malgranda. Ni atribuas tiun stagnon ĉefe al la neregula aperado de la numeroj, la malgrandeco de la Redakta Komitato kaj la lingva barilo, kiun CED mem konstruis en la komenco per



Prof. d-ro
Richard E. Wood,
redaktoro
de "La monda
lingvo-problemo"

sia elekto de pure esperantlingva titolo por ne pure esperantlingva revuo. La nuntempa ekonomia situacio en multaj landoj akriĝas tion, ĉar bibliotekoj ne nur ĉesigas abonojn sed unue rezignas pri periodaĵoj kun fremdlingvaj titoloj, ĉar ili ŝajnas malplej necesaj. La sekvo de tiuj mankoj estas revuo, kiu bezonas grandan ĉiujaran subvencion de UEA sed ne sufiĉe impone influas la pensadon pri lingvaj problemoj en decidpovaj medioj. La malgranda legantaro siavice kondukas al tio, ke sciencistoj foje sendas al *LMLP* la manuskriptojn, kiuj ne sufiĉe kvalitas por aliaj revuoj.

La plurlingva titolo de *LPLP* respegulos la (al pluraj homoj ankoraŭ ne sciatan!) fakton, ke la revuo aperigas artikolojn en pluraj lingvoj. Ĉiu biblioteko povos indeksi ĝin en la propra lingvo. CED povos reklami ĝin komforte en multaj lingvoj. Vi unuope

povas pli facile montri ĝin al abonantoj — instruistoj, politikistoj, bibliotekoj ktp. La titolo enhavas la esprimon "lingvo-planado", kiu estas la nova sed jam agnoskata faktermino por ĉiu agado, kiu celas konscie influ lingvojn kaj lingvajn situaciojn. Sciencistoj, kiuj okupiĝas pri lingvaj problemoj, scias tiun terminon en siaj lingvoj (language planning, Sprachplanung, planification linguistique, jazykove planirovanie ktp.). Por aliaj, la titolo atentigos, ke, kie ekzistas lingvaj problemoj, ekzistas ankaŭ metodaro por strebi al ties solviĝo.

La eminentaj fakuloj en la Redakta Komitato signalos al ĉiu samfakano, ke temas pri altranga, fidinda scienca revuo. La komitatanoj, juĝante manuskriptojn, ankaŭ rekte kontribuos al la kvalito de la enhavo. Krome, ili nature mem pli ofte verkos por la revuo kaj instigos abonojn.

Gravas ankaŭ, evidente, ke la aperritmo estu regula. Ni intencas daŭre labori por tio. Ĝuste nun pretas la enhavo de 3 novaj numeroj: la lastaj 2 de la volumo 6 kaj la unua de la volumo 7. Kvankam ni ne plu ligas volumon al jaro, ni planas ĝenerale aperigi unu volumon (tri numerojn) ĉiujare, do la volumon 7, la unuan sub la nova titolo, interne de 1977.

Kio estos la temaro de la nova *LPLP*? Ĝi aperigos artikolojn kaj recenzojn pri lingvaj problemoj, kiel ĝis nun. La problemoj povos montriĝi en urbo, regiono, lando, kontinento, internacia organizaĵo aŭ alimédie, sed manuskriptoj, kiuj analizas lingvajn malfacilaĵojn en la vivo **internacia** ĝuos specialan preferon. El la paĝoj de *LPLP* oni lernos ankaŭ pri la metodoj de problemsolvado en la lingva kampo. Do, la temaro restos tiu de la ĝisnuna revuo, sed la kvalito de la artikoloj iĝos pli alta, sekve de la prestiĝiga kampanjo, kiu akompanos la novan titolon kaj la plivastigatan Redaktan Komitaton.

Kion, fine, la unuopa esperantisto povas fari por *LPLP*? Vi povas ludi ĝis kvar gravajn rolojn. Unue, *LPLP* bezonas vin kiel **abonanton**, evidente. Ĝi kostas nur 30 gld. por volumo de 3 numeroj; similaj fakrevuoj kostas duoble tiom. Do, kiam vi renovigas viajn membrecojn kaj abonojn ĉe UEA aŭ via peranto, ne forgesu *LPLP*! Due, sub la nova titolo vi povos certe ludi la rolon de neoficiala **aboniganto**. Ĉu ekzistas eĉ unu urbo sen iaj lingvaj problemoj? Ĉu, do, ekzistas urba biblioteko, kiu ne bezonas la solan scienca revuon pri tiu problemaro? CED disponigos al vi informfoliojn kaj abonilojn. Kaj, se vi konas legemulon, kiu ekzemple pro valutaj kaŭzoj ne povas aboni la revuon, kia bela donaco estus *LPLP*! Trie, vi povas servi en la rolo de kritika **leganto**, kiu ne nur surbretigas siajn ekzemplerojn sed legas ilin; ne nur legas sed uzas la informojn tie trovitajn; kaj ne nur akceptas ĉion, kion vi legas, sed informas la redakcion pri viaj reagoj kaj pri la temoj, kiuj laŭ vi bezonas pri-trakton en postaj numeroj. Kaj kvare, multaj esperantistoj estas kompetentaj, analizi lingvajn problemojn kaj verki sciencecajn raportojn. Ili bonvenas en la rolo de **aŭtoroj**. (Skribu por detaloj al la redaktoro: prof.

Richard E. Wood, Dept. of Languages, Adelphi University, Garden City NY 11530, Usono). Se vi sendos manuskripton al *LPLP*, oni juĝos ĝin laŭ la samaj normoj, kiel ĉe ceteraj fakrevuoj. Se ĝi konvenos al la temaro de *LPLP* kaj, se ĝi interesus kaj konvinkus diverslandan legantaron kun ĝeneralaj lingvaj intereso kaj, parte, fakaj scioj, ĝi estos akceptebla. *LPLP* celos komunikigi, je scienca nivelo, esperantistojn kaj ne-esperantistojn en **ambaŭ** direktoj.

CED havas revu-revon: altigi la *LPLP*-abonantaron de la nuna nombro de 300 ĝis entute 1000 interne de du jaroj. Ĉu realigeblas nia espero, aldoni 350 abonojn en 1977 kaj 350 en 1978? Se vi ekabon(ig)os hodiaŭ, ni jam bezonos por 1977 nur 349. Kaj se ni atingos la celon, la revuo per la abon-enspezoj povos tute kovri siajn kostojn. Ekde tie, ĉiu kroma abono donos profiton — al CED kaj, evidente, al la leganto mem.

D-ro Jonathan Pool,
estrarano de CED

LINGVA SERVO DE UEA:

Helpo je dispono

ĈU VI LOĜAS izolita, sen kontakto kun aliaj parolantoj de Esperanto? Ĉu vi lernis nur per lernolibro kaj ne havas instruiston, al kiu vi povus fari demandojn? Tiam vi kredeble de tempo al tempo renkontas lingvajn problemojn, por kiuj vi ne sukcesas trovi solvon. Por ĉiuj membroj de UEA la solvo estas tute simpla. Skribu al komisiito de la Lingva Servo de UEA.

Je dispono de la membroj estas kvin lingve tre spertaj personoj, kiuj estas pretaj respondi al unuopaj lingvaj demandoj. Kompreneble ili ne estas pretaj korekti manuskriptojn, legi originalajn romanojn, aŭ listigi ĉiujn zamenhofajn vortojn, en kiuj troviĝas la litero B! Sed pri apartaj punktoj de gramatiko, elparolo aŭ vortsignifoj ili volonte respondos laŭ sia kapablo.

Jen la nomoj kaj adresoj de la komisiitoj:

A.D. Atanasov, Poptomov 48, Sofia, Bulgario.
H.A. de Hoog, Braveld 16, Castricum-1680, Nederlando.
Prof. N. Kawasaki, Bandai-higasi 49, Sumiyosi-ku, Osaka, 558, Japanio.
W. Schmid, Kurohama 4537, Hasuda-si, 349-01, Japanio.
A. Venture, 55 Park Hill, Carshalton, Surrey, SM5 3SE, Britio.

Skribante al komisiito, nepre observu la jenajn regulojn:

1. La Lingva Servo pretas respondi unuopajn lingvajn demandojn, sed ne povas entrepreni la korektadon kaj reviziadon de manuskriptoj.
2. La Lingva Servo rajtas rifuzi respondon al demando, kiu ne estas skribita en la Internacia Lingvo, aŭ kies respondo ne estas antaŭpagita per internacia respond-kupono, respond-poŝtkarto aŭ afrankita koverto.
3. La Lingva Servo rajtas rifuzi respondon al demando, al kiu ne estas aldonita aktuala membro-marko de UEA.

Amikeco kaj la Movado

LANĈITA DE UEA antaŭ ok jaroj, ĉi tiu iniciato sukcesis nur parte populariĝi en la Esperanto-movado. Antaŭ tri jaroj (v. *Esperanto*, marto 1974, p.48) ni skribis, ke la Semajno de Internacia Amikeco sukcesis pli multe hejmiĝi en la ekstermovadaj rondoj, ol en la Movado mem. Pli-malpli tiel estas ankaŭ nun. Tiel eble eĉ devus esti, ĉar al la esperantistoj apenaŭ necesas paroli pri la internacia amikeco. Estas facile kompreneble, ke la esperantistaro iom skeptike rilatas al la Semajno, eble ĝuste pro tio, ke ĝi estas nur "semajno". En la Movado ja ne temas nur pri unu semajno en kiu oni okupiĝus pri internacia amikeco, pri proksimiĝo de la homoj kaj popoloj. Ĉi-foje temas eĉ ne nur pri unu jaro, sed pri la tuta ĝisnuna historio de la Esperanto-movado, ĉar internacia amikeco kaj interhoma kompreniĝo estas la ĉefaj pilastroj sur kiujn apogas sin la baza idearo de la movado por la Internacia Lingvo.

Okupiĝante pri internacia amikeco, rekte aŭ nerekte, en sia tuta aktiveco, en sia ĉiutaga laboro en aŭ por la Movado, ĝuste esperantistoj havas ion por diri al la mondo ĉi-rilate. Oni povas kompreni la Semajnon

kiel okazon por proksimigi al la neesperantista publiko la ideon de la Internacia Lingvo kiel rimedo de internaciaj kompreno kaj amikeco. Ankaŭ aliaj "semajnoj" aŭ "tagoj" ekzistas pro similaj kialoj. Dum la Tago de Homaj Rajtoj oni faras streĉojn popularigi tiurilatan dokumenton de UN, dum la Monda Ŝpar-Tago — ankaŭ ĝi ekzistas — oni klopodas popularigi la ideon de ŝparado, dum "Semajno de Ĉeĥoslovaka Filmo" ekz. en Nov-Jorko oni faras organizitajn klopodojn proksimigi la valorojn de tiu arto en Ĉeĥoslovakio al la usona kultura publiko. Sekve, la Semajno de Internacia Amikeco efektive estas aŭ povus esti "Semajno de la Internacia Lingvo kiel Rimedo de Internacia Amikeco".

Kvankam iom malneta kaj naiveca, precipe en siaj proponoj, la konsilaro pri la Semajno, aperinta kiel n-ro 1 en la serio "Konsilaroj pri Esperanto-agado", kiun eldonas UEA, prave akcentas direktiĝon de la Semajno al la ĝenerala, do ekstermovada publiko. Komprenita tiamaniere, la Semajno de Internacia Amikeco estas ja invito dum tiuj sep tagoj en februaro organizite elmontri al la ekstermovada publiko la bazajn celojn kaj la plej videblajn rezultojn de la Esperanto-movado. Finfine, tiu internacia amikeco kaj la flegado de la internaciaj pens- kaj konduk-manieroj estas la ĉefaj rezultoj de la 90-jara historio de la Esperanto-movado. Krome, la internacia amikeco restas ankaŭ plue la ĉefa celo, la ĉefa motoro de la Movado. Ĉio alia, inkluzive la solvon de la monda lingvo-problemo, estas nur rimedo por atingi la homan kaj popolan proksimiĝon, la internacian amikecon al kiu estas dediĉita la Semajno.

ĜUSTIGA LETERO:

Kiu ĉefrolis?

MI ESTIS tre malagrabla surprizita per tia emfazado de miaj meritoj por *Scienca mondo*, kiu aperis en la aprila numero de *Esperanto*. Unue, ĉar mi ne estas laborinta en tiu rilato por ke oni emfazu miajn meritojn kaj due, ĉar la meritoj en tiu rilato de mia bona amiko prof. B. Popović ne estas malpli grandaj ol la miaj.

Jam antaŭ 15 jaroj mi proponis al B.P., kiel tiama ĝenerala sekretario de ISAE, ke ISAE aliĝu al la Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj (MFSL). Li tuj pristudis la proponon, trovis ĝin bona kaj multe kontribuis ke, unue la estraro de ISAE kaj poste ĝiaj membroj akceptis la aliĝon al MFSL. De tiam li regule, plejparte je sia propra kosto, vizitis la assembleojn de MFSL kaj aktive partoprenis plurajn simpoziojn de MFSL, ĉiam kiam li povis al la ĉeftemo aliĝi ankaŭ la lingvan problemon. Miaj klopodoj per la Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario, kiu estas tre aktiva membro de MFSL, trovis bonegan subtenon en real-

isma kaj penetranta argumentado de B.P. Komence ni renkontis plenan neinformitecon, eĉ primokon, kiam ni menciis Esperanton. Paŝon post paŝo, sisteme kaj obstine, adaptiĝante al la cirkonstancoj kaj al la atingitaj sukcesoj, ni pliproksimigadis Esperanton al la gvidaj rondoj de MFSL. Oni povas vere diri, ke B.P. kaj mi senlace "boris la monton granitan" kaj finfine venis la granda sukceso per la decido aperigi la revuon *Scienca mondo* ankaŭ en Esperanto.

Eĉ desur la malsanuleja lito, tagon antaŭ operacio, B.P. skribis leterojn, serĉante eblecojn por sekurigi la necesan paperon por *Scienca mondo* per financaj rimedoj de ISAE.

Publikigante ĉi tiun leteron, vi helpas ne nur, ke la legantoj de *Esperanto* estu bone informitaj, sed ankaŭ ke mi persone ne sentu min malagrabla rilate al mia bona amiko B.P. kaj rilate al ĉiuj kolegoj kiuj konas la agadon kaj aktivecon de B.P.

Sofio, 1976 12 01

V. Peevski

REDAKCIA NOTO: Ni volonte publikigas la leteron de prof. Peevski, kies rolo eble troe emfaziĝis en nia aprila n-ro (p. 63) per nia ilustraĵo kaj la teksto, kiu akompanis ĝin. Cetere, tiutempe al ni ne estis konataj detaloj, kiujn enhavas la nuna letero de prof. Peevski.

Lingva problemo – novaj trajtoj

Kiel anoncote en nia oktobra n-ro (p. 171), en la sidejo de la Informcentro de Unuiĝintaj Nacioj en Romo, fine de oktobro kaj komence de novembro okazis la seminario pri la temo "Lingva Demokrateco". Al la seminario (ĝi unue estis planita por la fino de majo kaj komenco de junio 1976) venis preskaŭ 90 personoj. Ni publikigas iom koncizigitan raporton de d-ro Renato Corsetti.

NENIU ankoraŭ inventis ordenon, kiun ricevus tradukistoj al kaj el la Internacia Lingvo. Se ĝi ekzistus, indus je ĝi M. Lipari, B. Casini, R. Triolle kaj L. De Yzaguirre, kiuj dum proksimume tridek horoj samtempe tradukis inter la itala, franca, kataluna kaj internacia lingvoj. Tio okazis en Romo dum la seminario pri "Lingva demokrateco", inter la 30a de oktobro kaj la 4a de novembro 1976.

Kial en Romo?

Dum la lastaj jaroj areto da romaj esperantistoj daŭre kunlaboris kun KER, la komisiono por eksteraj rilatoj, de TEJO, la junulara sekcio de UEA. Ili aparte interesiĝis pri la politikaj facetoj de la Esperanto-movado, pri la socipolitika potencialo de la Internacia Lingvo kaj pri similaj agadoj. Tra la jaroj ili kontribuis al pliklarigo kaj plipolurigo de la nocioj, kiel ekz. "lingva imperiismo", "kultura superrego", "internacia lingvo kaj internaciismo". Spurojn pri ilia ĉeesto en ĉiuj KER-seminarioj pri tiuj ĉi problemoj oni povas trovi en TEJO-publikaĵoj. Se vi nepre volas legi kelkajn nomojn, mi menciui nur tiujn de la komenca kerno: R. Corsetti, M. La Torre kaj N. Vessella.

Kiam en la pasinta jaro evidentiĝis, ke KER serĉas organizantojn por plia seminario, la roma grupo transprenis la taskon, sen granda entuziasmo pri la amaseto da praktika laboro, kunligita kun tiaj aranĝoj. Cetere, Romo estis taksata kiel interesa loko fare de la Eŭropa Junulara Fonduso, kiu estas faka fonduso de la Eŭropa Konsilantaro, Strasburgo, kaj kiu decidis helpi finance la seminarion. Verŝajne ilia intereso fontis el la mediteraneeco de Romo, kiu ebligis partoprenon de sud-eŭropanoj, kiuj kutime estas fortranĉataj de tiu "centra norda Eŭropo kie okazas aferoj".

Pri kio

Fidelaj aĉetantoj de TEJO-KER-dosieroj scias, ke oni jam utiligis ĉion, kio povas esti utiligata en simila konteksto por ĉiam novaj titoloj kaj temoj de seminarioj. (Jam okazis seminarioj pri: "Lingvo kaj politiko", "Lingvo kaj kulturo", "Lingvo kaj socio", "Lingvo kaj malkoloniigo"). Oni devis elekti inter la malmultaj restintaj sencohavaj titoloj, kaj la rezulto estis "Lingva demokrateco".

Sub tiu ŝildo tamen oni pritraktis la jam konatajn problemkampojn, kiuj estis ordigitaj laŭ tri subtemoj. La unua subtemo rilatis al lingva demokrateco en samlingva komunumo. Esence oni parolis pri la sociaj "lektoj" (lekto estas pli malpli lingva variaĵo). Ankaŭ en la kadro de unulingvaj landoj ekzistas tamen problemoj, ĉar la malsamaj sociaj klasoj parolas malsamajn variaĵojn de la sama lingvo. Ĉiu el la legantoj povas facile pensi pri la propra lingva komunumo, kaj kompari la parolmanieron de manlaboristoj kaj de superaj burĝaj tavoloj. En pluraj lingvaj komunumoj ekzistas krome geografiaj lektoj (la tiel nomataj dialektoj), kiuj ofte multe malsamas al la norma oficiala lingvo.

Ĉio ĉi kaŭzas problemojn, precipe en lernejoj, kie filoj de, ekzemple, profesoroj havas pli bonajn sukcesancojn ol filoj de kamparanoj, ĉar oni postulas konon kaj uzon de la profesora "lekto". Pri demokrataj solvoj, aŭ eksperimentoj por demokrataj solvoj, parolis kelkaj prelegantoj. Prof. Nora Galli de Paratesi raportis pri siaj eksperimentoj en la itala landoparto Kalabrio, kie la bildo estas eĉ pli komplika pro la ĉeesto de kelkaj albanlingvaj malplimultoj. S. Belieni kaj L. Santamaria parolis pri la komplikaĵoj kaŭzitaj de sociaj lektoj en la japana kaj en la java lingvoj.



En la dua subtemo estis preparolitaj problemoj de demokrateco rilate lingvajn malplimultojn, kiuj vivas en la administra kadro de ŝtato, kies plimulto devigas ĉiujn al uzado de la plimulta lingvo. La temo estas tre aktuala en pluraj okcidenteŭropaj landoj, kaj, spite al avangardaj ideoj de Lenin, ĝi iel estas perceptebla ankaŭ en socialismaj landoj, malgraŭ la absoluta nekomparebleco inter la du situacioj ĝenerale.

Ni havis bonŝancon akcepti en Romo reprezentantojn de kelkaj malplimultaj luktantaj movadoj kaj fakulojn pri la ĝenerala teoria flanko de la problemo. Ĉeestis kaj entuziasmigis la partoprenantojn s-ino Olivan Montserat, reprezentantino de kataluna politika partio, vaskino (aŭ eble pli precize eŭskerino) Uribarri Ruiz, Boris Pahor, vicprezidanto de AIDMLK, Sergo Salvi, aŭtoro de pluraj itallingvaj verkoj pri malplimultaj problemoj, d-rino V. Osolnik kaj d-ro B. Grabnar, kiuj parolis pri malplimultoj en Jugoslavio kaj aparte pri slovenoj en Italio kaj Aŭstrio.

La tria subtemo koncernis demandojn, kiujn oni povas titoli "Demokrateco je internacia nivelo". Esperanto kaŝis sin ĝuste en tiu ĉi programpunkto. Fakte, se estas vero, ke ĉiuj vojoj kondukas al Romo, estas nekontestebla kroma vero, ke en niaj seminarioj ĉiuj lingvaj problemoj kondukas al Esperanto. Ĉiukaze, la partoprenintoj povis ĝui altnivelajn ĝeneralajn problem-prezentadojn fare de profesoroj M. Duc Goninaz kaj A. Bausani. Laŭ kutima klareco kaj profundeco parolis ankaŭ Hans Bakker, la "ĉiama", "spirita patro" de ĉiuj KER-aranĝoj. Prof. I. Szerdahelyi, atendata ĝis la lasta momento, ne sukcesis atingi Romon.

Pro bonaj kontaktoj jam establitaj kun fakuloj de la Universitato pri Oriento en Napolo, oni sukcesis aŭdi lekciojn pri pluraj ekstereŭropaj situacioj. Ni jam men- ciis Japanion kaj Indonezion, sed necesas aldoni ankaŭ Hindan Union (profesoroj Raza kaj Rossi). Pri Afriko parolis profesoroj Knappert (Londono), Cardona (Romo) kaj Pennacchietti (Venecio), kiu skizis ĝenerale la situacion en ĉiuj arablingvaj landoj.

Nu, la programo estis tiel densa ke restis tempo nek por spiri nek por funde debati.

Kiulingve

La organizantoj estis tiel demokrataj, ke ili devigis ĉiujn prelegantojn prelegi en la propra gepatra lingvo (inkluzive de la kataluna, la vaska, la slovena) aŭ en Esperanto, kiu funkciis krome kiel pontolingvo.

Ekzemple kiam okazis prelego en la kataluna ĝi estis tradukita samtempe al Esperanto kaj el Esperanto al la itala. Simile okazis pri la prelegoj en la slovena, vaska, kastilia, germana.

Kaj krome unu vesperon ni aŭskultis kantojn en Esperanto de Gianfranco Molle, unu tagon ni ekskursis tra la urbo, la lastan tagon ni debatis pri "movadaj problemoj"; (ekzotika spicaĵo estis la komparo inter la internacia kaj la ŝuahila lingvoj fare de Nino Vessella).

Konklude

Oni rajtas sin demandi kiucele kaj kun kiuj rezultoj la tuta aranĝo okazis.

Nu, la unua celo estis "Konigo de tiaj temoj al sud-eŭropaj esperantistoj". Laŭ nia provizora takso ĝi estis atingita. Ĉeestis fakte kvin junaj grekaj esperantistoj, ses jugoslavaj kaj du hispanaj. Ĉeestis krome multaj italoj, kelkaj francoj, belgino, du poloj, nederlandano kaj japano. Por ili temis ĉefe pri plikleriĝo pri tiuj ĉi temoj.

La dua celo estis "Konigo de la Internacia Lingvo kiel normale funkcia lingvo de normale pensantaj homoj" al italaj lingvistaj rondoj. Ankaŭ tiun ĉi celon ni taksas atingita. Malgraŭ amaso da antaŭjuĝoj, mal-facile tiuj ĉeestintaj lingvistoj povos nun nei la fenomenon "Esperanto".

Kompreneble ni ne estas tute kontentaj pri ĉiuj aspektoj de la seminario (manko de sufiĉa debatado, manko de ekstereŭropanoj, ktp.); pri la mankoj ni parolos abunde dum la venontaj monatoj por klopodi forigi ilin estonte.

R. Corsetti



KONFERENCO EN PADERBORN:

Paderborn estas fenomeno

JAM DE KELKAJ JAROJ Paderborn (FR Germanio) fariĝas aparta nocio, ne nur en la germana kaj internacia Esperanto-movado, sed ankaŭ kaj precipe en la neesperantistaj medioj, ĉefe pedagogiaj. Paderborn sendube jam nun estas iaspeca ĉefurbo de la Movado en FR Germanio, ne pro tio, ke el tiu malgranda urbo estus direktata la landa Esperanto-agado, sed pro la fakto, ke Paderborn estas la scenejo de aparte vigla Esperanta aktiveco, eksperimentejo de nova movada taktiko, bredejo de novstilaj aktivuloj kaj lanĉejo de novaj labormetodoj. La konferenco pri kiu ni ĉi tie raportas kaj pli frua aranĝo, kiun ni pretere aludas, devus esti sufiĉa kialo por aserti, ke Paderborn estas movada fenomeno.

Inter la 24a kaj 28a de novembro 1976, en la Esplorcentro de Paderborn, sub la gvido de Hermann Behrmann, okazis konferenco pri la temo "Interlingvistiko en scienco kaj klerigo". Ĝi arigis plurajn dekojn da sciencistoj kaj pedagogoj el 14 landoj. Inter la 36 prelegoj — kio montriĝis tro ambicia programo por la kvin konferencaj tagoj — elstaris tiuj de: prof. d-ro I. Szerdahelyi, Hungario (La aktuala stato de interlingvistiko; La unua 5-landa eksperimento; Lingvistiko — lingvomodeligo), prof. d-ro F. Pennacchiotti, Italio (Ĉu la Internacia Lingvo Esperanto estas hindeŭropa lingvo?), prof. d-ro Ivo Lapenna, Britio (La Internacia Lingvo kiel jurscienca komunikilo), H. Sonnabend, FR Germanio (La Esperanto-instruado en la elementa lernejo), d-rino M. Šaturová-Seppová, Ĉeĥoslovakio (Planlingva instruado en televido), H.D. Maas, FR Germanio (Aŭtomata prilaborado de tekstoj en la Internacia Lingvo sub speciala konsidero de la aŭtomata lingvo-traduko), prof. A. Hrstiĉ, Jugoslavio (La Internacia Lingvo kiel komunikilo de la ekonomiscienco), prof. d-ro H. Frank, FR Germanio (Prijuĝkriterioj de komuna dua lingvo por Eŭropo), W. Włodarczyk, Pollando (La vorttrezoro de la nuntempa Lingvo Internacia Esperanto), R. Schulz, FR Germanio (La Internacia Lingvo kiel helpilo kaj peranto de la beletristiko), prof. d-ro V. Mužić, Jugoslavio (La Internacia Lingvo kiel komunikilo kaj esplorobjekto de la edukscienco), prof. L. Weeser-Krell, FR Germanio (La Internacia Lingvo en la varbado), prof. L. Landa, Nederlando (Algoritma provo rilate la fremdlingvan instruadon), C. Gacond, Svislando (La apliko de la programita instruado en la planlingva instruado).

La partoprenantoj de la konferenco diskutis kaj akceptis ok rezoluciojn, kiuj celas altiri atenton de diversaj ekstermovadaj kaj movadaj institucioj kaj instancoj. La organizantoj de la konferenco planas eldoni la prelegaron libroforme, en la serio inaŭgurita



Pluraj interesaj kontaktoj dum la konferenco en Paderborn: Prof. I. Lapenna (supre, en la unua vico) kaj profesoroj F. Pennacchiotti, A. Hrstiĉ, H. Frank kaj I. Szerdahelyi (malsupre; de maldekstre).

per la volumo *Klerigo kaj prikalkulado*, kiu aperis meze de la pasinta jaro.

La konferenco en Paderborn ne estis movada aranĝo, ĝin organizis ekstermovada scienca institucio kaj financia nacia registara instanco. La Internacia Lingvo rolis aŭ ĉefrolis dum la konferenco, ne nur kiel temo de la sciencaj esploroj, sed precipe kiel komunikilo, kiel konferenca rimedo, trudiĝinta per si mem kiel ĉefa laborlingvo, malgraŭ tio, ke pluraj prelegoj okazis en la germana kaj ke principe ekzistis teknikaj eblecoj por samtempa tradukado.

En nia revuo preskaŭ senmencie pasis pli frua paderborna aranĝo, okazinta en Primošteno, Jugoslavio, en la dua parto de julio 1976. Ankaŭ en tiu aranĝo — Someraj Internaciaj Universitataj Semajnoj (SIUS) — Esperanto estis anoncita kiel unu el la laborlingvoj, sed efektive trudiĝis kiel la ĉefa komunikilo. Ankaŭ SIUS unuavice celis ekstermovadan atenton kaj ĝi fidelos al tia orientiĝo ankaŭ en siaj estontaj sesioj. Ĝeno por kompreni la fenomenon Paderborn estas la vasteco de la agadkampoj pri kiuj okupiĝas tuta aro da institucioj, organizaĵoj, laborgrupoj kaj kluboj, kiuj ligiĝas al ĝia nomo. Tio tamen ne malhelpas aserti, ke Paderborn estas aparta fenomeno en la internacia Esperanto-movado.

Skolta kampanjo

SKOLTA Esperantista Ligo jam skizis la principojn, laŭ kiuj SEL en 1977 aktivos. Tre facile oni konstatas, kiel pene kaj nekomplete la ĝenerala skolta programo povas realiĝi pro la lingvaj problemoj inter diversnaciaj skoltaj. Tial SEL decidis eldoni libreton, kiu enhavos ideojn, proponojn kaj konsilojn por pli bona kaj intensiva internacia kunlaboro. Kompreneble, inter la konsiloj troviĝas ankaŭ instigo al la lernado de Esperanto kaj la uzo de la Internacia Lingvo en skoltaj kontaktoj. Esperanto tiel ne plu estos ekstera, ne-skolta afero, pri kiu la skoltaj apenaŭ interesiĝas, sed la lingvo estos prezentata kiel logika parto de tiu programo.

Por konvinki la vastajn skoltajn rondojn — la du skoltaj mondorganizaĵoj kune havas ĉ. 20 milionojn da membroj — ni petis al d-ro L. Nagy, la ĝenerala sekretario de la Skolta Movado, verki antaŭparolon de la aperonta libreto. Ne nur, ke li akceptis la proponon, sed li esprimis kontenton pri la helpo, kiun SEL donas al la ĝenerala skolta programo. Dume, alia funkciulo

de la Skolta Monda Oficejo, kiu respondecas pri la publikaj rilatoj, proprainiciate sendis al ni proponojn por pliperfektigo de la libreto.

Pro la fakto, ke la Esperanto-movado estas kontraŭ ĉiu formo de lingva diskriminacio, la libreto aperos en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj. Jam nun ni estas certaj pri ok eldonoj. Por helpi al UEA en ties klopodoj disvastigi Esperanton en neeŭropaj landoj, inter tiuj lingvoj troviĝos ankaŭ la araba kaj la japana. Por la aktiveco en la sudamerika kontinento, kompreneble, ankaŭ la hispana estos uzata.

En julio 1977, SEL oficiale prezentos sian libreton al la Skolta Konferenco, kiu okazos en Montrealo, Kanado. Tuj poste, dekoj da unuopuloj, kluboj kaj asocioj prezentos ĝin al lokaj, regionaj kaj landaj skoltaj asocioj kaj vendos ĝin en internaciaj skoltaj kunvenoj. Redaktoroj de skoltaj gazetoj ricevos recenzajn ekzemplerojn kaj ni scias ankaŭ, ke la libreto estos vendata, kiel normala skolta objekto, en pluraj vendejoj de la Skolta Movado.

La scio, ke la Skolta Movado atente rigardas niajn agojn instigas SEL eĉ al pli granda fortostreĉo, por ke la kampanjo estu kiel eble plej bona kaj mondvasta. Ĉiu, kiu emas kunlabori, estas bonvena!

J.K.H.

Lerneja Bulteno

Redaktas: Germain Pirlot, Kemmelbergstr. 5/b.3, B-8400 Oostende, Belgio.

RIDEF kaj Esperanto

En aŭgusto pasintjare, la 8a Renkontiĝo Internacia de Edukistoj Freinet (RIDEF) akceptis Esperanton kiel laborlingvon de la Internacia Federacio de la Movadoj por Moderna Edukado (FIMEM). Tiu federacio arigas edukistajn asociojn de 38 landoj. La sukceso en Pollando ŝuldiĝas ne nur al la fakto, ke esperantistoj troviĝis inter la organizantoj de la 8a RIDEF en Varsovio, sed ankaŭ al tio, ke proksimume triono de la 150 partoprenantoj estis parolantoj de Esperanto. La 9a RIDEF okazos en julio 1977 en Lisbono, dum oni por 1978 pensas pri Svedio.

Informoj ĉe: s-ro Henri Menard, Le Pallet, F-44330 Vallet, Francio.

Konferencoj de ILEI

La pasintjara konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazis en San Marino, fine de julio 1976, kaj kunvenigis ĉ. 80 partoprenantojn el 13 landoj. La ĉeftemo de la konferenco ligiĝis al la kontraŭrasisma jardeko lanĉita de UN kaj nomiĝis: "Ne raso, sed ni infanoj loĝas en la mondo".

Meze de decembro 1976 ankoraŭ ne estis klare kie okazos ILEI-konferenco en 1977, kvankam la datoj

jam estis fiksitaj — de la 14a ĝis la 24a de julio. Oni tiurilate konsideras eblecojn en Belgio kaj en Kanariaj Insuloj. En 1978 ILEI emas konferenci en la norda Afriko (Maroko aŭ Tunizio).

Informoj: ILEI, Casella Postale 22, I-54100 Massa C., Italio.

Pri "Internacia pedagogia revuo" (IPR)

Post proksimume unujara paŭzo *Internacia pedagogia revuo*, kiun eldonas ILEI, denove komencis aperadi. Ĝi nun estas presata en Italio (antaŭe en Nederlando). Por malcentrigi la administran laboron oni nun distribuas la revuon ekskluzive tra la landaj sekcioj de ILEI, kiuj do ankaŭ akceptas abonojn. La jara abonprezo estas 8,00 germanaj markoj.

Informoj: ILEI, Casella Postale 22, I-54100 Massa C., Italio.

AEDE/ILEI-kolokvo en Parizo

Reprezentantoj de Eŭropa Asocio de Instruistoj (AEDE) kaj ILEI kunvenis la 10an kaj 11an de novembro 1976 en Parizo kaj diskutis la lingvajn barojn, kiuj malhelpas la plifortiĝon de la eŭropa unuiĝo, kaj la rolon, kiun tiurilate povus ludi la Internacia Lingvo Esperanto. En la fina rezolucio oni proponas esplorojn rilate la facilecon de la lernado de Esperanto kompare kun la naciaj lingvoj, rilate la uzeblecon de Esperanto fare de diversnaciaj lernejoj kaj rilate la influon, kiun lernado de Esperanto havus je estiĝo de internacia sinteno. Oni sugestas, ke la rezultoj de tiuj esploroj estu komunikitaj al eŭropaj eduk-instancoj.

Plia UN-dokumento en Esperanto

En "Esperanto", novembro 1976 (p.178), aperis mencio pri la esperantlingva traduko de ĉi tiu grava dokumento, kiun la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj akceptis, sub la n-ro 1514 (XV), en sia 15a sesio en la jaro 1960. La tradukon prizorgis la aŭstralia ambasadoro ĉe UN Ralph Harry, konsilanto de la Laborgrupo de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko, kaj ĝin eldonis (en decembro 1975) la Oficejo de Publika Informado ĉe la Sekretariato de UN. Ĉar temas pri hektografia eldono, en limigita eldonkvanto, nia revuo decidis publikigi la tradukon kaj tiamaniere kontribui al ĝia disvastigo. Ni ligas ĉi tiun publikigon al la Laborplano de UEA okaze de la Jardeko de Aktivado por kontraŭbatali Rasismom kaj Rasan Diskriminacion, kiun ellaboris la antaŭa prezidanto de UEA, prof. d-ro Ivo Lapenna, kaj akceptis la Komitato de UEA en la 59a UK en Hamburgo (v. "Esperanto", majo 1974).

DEKLARACIO PRI LA DONADO DE SENDEPENDECO AL KOLONIAJ LANDOJ KAJ POPOLOJ

La Ĝenerala Asembleo,

Memorante la firman decidon, proklamitan de la popoloj de la mondo en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, reaserti kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco, je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj kaj de nacioj grandaj kaj malgrandaj kaj antaŭenigi socian progreson kaj pli altan vivnivelon en pli granda libereco,

Konscia pri la neceso krei kondiĉojn de stabileco kaj bonstato kaj pacajn kaj amikajn rilatojn, surbaze de respekto al la principoj de egalaj rajtoj de ĉiuj popoloj kaj de ilia rajto decidi pri si mem kaj de universala respekto al, kaj observado de, la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj por ĉiuj sen distingo de raso, sekso, lingvo aŭ religio,

Rekonante la pasian deziron por libereco en ĉiuj dependaj popoloj kaj la decidan rolon de tiuj popoloj en la atingo de sia sendependeco,

Sciante pri la kreskantaj konfliktoj, kiuj rezultis el la rifuzo de, aŭ obstakloj sur la vojo al, la libereco de tiuj popoloj, konfliktoj, kiuj estas grava minaco al la monda paco,

Konsiderante la gravan rolon de Unuiĝintaj Nacioj kiel ilo por helpi la movadon por sendependeco en teritorioj sub kuratoreco kaj neaŭtonomaj,

Rekonante, ke la popoloj de la mondo arde deziras la finon de koloniismo en ĉiuj ĝiaj manifestiĝoj,

Konvinkite, ke la daŭra ekzisto de koloniismo malobligas la evoluon de internacia ekonomia kunlaborado, malhelpas la socian, kulturan kaj ekonomian evoluon de dependaj popoloj kaj kontraŭagas la idealon de Unuiĝintaj Nacioj de universala paco,

Asertante, ke popoloj povas, por siaj propraj celoj, libere disponi pri siaj riĉaĵoj kaj rimedoj naturaj sen difektiĝo de iuj ajn devoj, kiuj fontas el internacia ekonomia kunlaborado, bazita sur la principo de reciproka profito, kaj internacia juro,

Kredante, ke la procezo de liberigo estas nerezistebla kaj neinvertigebla kaj ke por eviti gravajn krizojn oni nepre devas meti finon al koloniismo kaj al ĉiuj praktikoj de apartigo kaj diskriminacio kunigitaj kun ĝi,

Bonvenigante la fakton, ke dum la lastaj jaroj multaj dependaj teritorioj atingis liberecon kaj sendependecon, kaj rekonante la pli kaj pli fortajn tendencojn al libereco en tiuj el tiaj teritorioj, kiuj ankoraŭ ne atingis sendependecon,

Konvinkite, ke ĉiuj popoloj havas neforigeblan rajton je plena libereco, la praktiko de sia suvereneco kaj la integreco de ilia nacia teritorio,

Solene proklamas la neceson fini, rapide kaj senkondiĉe, la koloniismon en ĉiuj ĝiaj formoj kaj manifestiĝoj;

Kaj por tiu celo

Deklaras, ke:

1. La subigo de popoloj al fremda subjugigo, superregado kaj fiekspluatado estas neado de fundamentaj homaj rajtoj, estas kontraŭ la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj estas obstaklo al la antaŭenigo de monda paco kaj kunlaborado.
2. Ĉiuj popoloj havas la rajton decidi pri si mem; per tiu rajto ili decidas sian politikan staton kaj libere strebas al sia ekonomia, socia kaj kultura evoluo.
3. Nesufiĉo de politika, ekonomia, socia aŭ eduka preteco devas neniam servi kiel preteksto por prokrasto de sendependeco.
4. Ĉiu perarmila agado aŭ subpremaj rimedoj ĉiuspecaj celantaj dependajn popolojn devas ĉesi, por ke ili povu praktiki pace kaj libere sian rajton je plena sendependeco, kaj la integreco de ilia nacia teritorio devas esti respektata.
5. Oni devas tuj fari paŝojn en teritorioj sub kuratoreco kaj neaŭtonomaj, aŭ en ĉiuj aliaj teritorioj, kiuj ankoraŭ ne atingis sendependecon, por transdoni ĉiujn povojn al la popoloj de tiuj teritorioj, sen iuj ajn kondiĉoj aŭ rezervoj, laŭ iliaj libere esprimitaj volo kaj deziro, sen iu ajn distingo de raso, kredo aŭ koloro, por ke ili povu ĝui plenajn sendependecon kaj liberecon.

6. Iu ajn agado celanta la partan aŭ tutan disrompon de la nacia unueco kaj teritoria integreco de lando estas malakorda kun la celoj kaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj.

7. Ĉiuj Ŝtatoj devas observi fidele kaj strikte la preskribojn de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la nuna Deklaracio surbaze de egaleco, neinterveno en la internajn aferojn de ĉiuj Ŝtatoj kaj respekto al la suverenaj rajtoj de ĉiuj popoloj kaj de ilia teritoria integreco.

REDAKCIA NOTO: La Esperantan tradukon de ĉi tiu dokumento, kaj precipe tiun de la *Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj*, bonvolu peti ĉe la Oficejo de Publika Informado, Unuiĝintaj Nacioj, New York, N.Y. 10017, Usono, aŭ ĉe vialanda Inform-Centro de UN. Aparte estas bonvenaj petoj de landaj asocioj, regionaj aŭ lokaj kluboj, por distribuo de pli grandaj kvantoj.

Leterkesto

Mi vendis kun permeso

En la jaro 1975, mi fondis la eldonejon "PLEJADO" per kiu mi intencas eldoni verkojn de senduba literatura valoro. Ĉar mi ne posedas kapitalon, estas tute nature, ke mi devas vendi miajn eldonaĵojn por pagi la presiston. Ŝajnas, ke la skribinto de la artikoleto "La nigra libromerkato" en Ateno (*Esperanto*, n-ro 849, p. 156), menciante mian nomon, tute ne konscias pri tio. Cetere, mi petis permeson kaj mi vendis librojn ĉe tablo, en plena lumo, sub okuloj de ĉiuj.

Lina Gabrielli, Italio

Absurda postulo pri entuziasmiĝo

Mi petas, kion signifas la lasta frazo en la artikolo pri la zagreba Pupteatra Festivalo, verkita de Spomenka Ŝtimec, kiu tekstas: Ĉu esperantistoj forlasas eventojn en Esperanto, aŭ ĉu Esperanto forlasas ilin? " (*Esperanto* 851, p.180).

Pupteatraĵoj estas tute aparta sceneja aranĝo por kiu ne devas ĉiu havi intereson, eĉ ne la konstantaj vizitantoj de teatroj, ĉar pupteatra repertuaro en sia grandega parto estas turnita al infanoj. Se plenkreskuloj ne havas intereson por infanaj fabeloj, tio ne signifas, ke ilin ne interesas kulturaj "eventoj" en la Movado. Pupteatra arto estas aparta fako kaj estas preskaŭ absurde postuli de plenkreskuloj entuziasmiĝon por tio, nur pro Esperanta lingvo.

Emilija Lapenna, Jugoslavio

Unesko

Mi bedaŭras, ke en la artikolo pri Unesko ("Idealo kiu realiĝas", p. 177, novembro 1976) ne estas menciita

s-ro E. D. Durrant, kiu de la esperantista flanko plenumis la preparan traktadon antaŭ kaj dum la kunveno de Unesko en Parizo, 1952, rezulte de kiu la Esperanto-afero aperis en la tagordo por Montevideo, 1954.

C. M. Houghton, Britio

Tradukpeto

Mi turnas peton al vi, ĉar mi troviĝas en tre granda embaraso. Nome: ĉu vi konsentus traduki por mi en Esperanton la artikolon troviĝantan sur la paĝo 190, en la numero novembra de via ŝatata revuo? Tre koran anticipan dankon. Kvankam akademiano, mi tamen ne konas ĉiujn lingvojn de l'mondo, pardonu!

R. Bernard, Francio

Konsterna recenzo

Min konsternis la recenzo de Probal Daŝgupto pri la traduko de *Bhagavad-Gîtâ* (*Esperanto*, n-ro 851). Al kiu celis tiu recenzante, aŭ vi presante? Recenzo kiun komprenas nur kvar-kvin homoj en la mondo (se tiom) apenaŭ indas la inkon por presi ĝin. Kion faru la kompatinda esperantisto, kiam li renkontas, ekzemple, **paradigmatiko**, **sintagmoj**, se li ne jam legis **alilingve** la verkojn de Michel Foucault, aŭ komprenas la grekan? Kiel li trovos la signifon de **logaritmi**? Eĉ **PIV** ne helpas lin pri la tri ĉi-supraj vortoj.

Laŭ mia kompreno, la ĉefa celo de recenzo estas, per takso de enhavo, gvidi la leganton al juĝo ĉu aŭ ĉu ne aĉeti la libron recenzitan. *Bhagavad-Gîtâ* prezentas profundajn filozofiajn konceptojn, sed la sanskrito de la originalo estas plejparte simpla kaj unusignifa. Kia ajn traduko de religia ĉefverko meritas seriozan recenzon kompreneblan. Mi forte dubas ĉu iu (di-kredanto aŭ ne) tiel recenzus tradukon de la *Biblio* aŭ de la *Korano*.

La artikoleto finiĝas per iom misprezenta traduko de ĉ.2:46. **Student' prudenta** ne precize ekvivalentas al la **Brâhmaṇasja viĝânataḥ** de la originalo. Strange, ke en tiu paragrafo s-ro Daŝgupto riproĉas la tradukinton, sed tamen utiligas ĉi ties neadekvatan tradukon. Tre plaĉus al mi legi tradukon de ĉi tiu sekcio fare de s-ro Daŝgupto mem.

Donald S. Lord, Britio

Ĉu nova litero?

En via kongresa (septembra) n-ro, sur la paĝo 142, en la lasta linio de la dua kolumno, mi trovis bulgaran urbo-nomon jene skribita: Târgoviște. — Nova litero en la Esperanta aboco!

Miaflanke mi ne povas aprobi tiun novigon. Tiom malpli, ĉar ĝi povas lanĉi vicon da postuloj pri novaj literoj. Ĝi estu Targoviște, Tirgoviște aŭ Turguviște, sed neniel tia, kia ĝi troviĝas sur la menciita loko. Ĉar morgaŭ jam — pro la precedento — eble kelkaj deziros ekzemple skribi literojn *ŝ, ĉ, ŝ* en la rusaj vortoj Brejŝnev, Voroneŝ, Faŝev, Vladimír, Jekaterina, Tereškova ktp., se ne paroli pri aliaj sonoj de la cirilaj kaj ceteraj ne-latin-skribaj lingvoj, same netroveblaj en la Esperanta alfabeto.

Tibor Ujlaky-Nagy, Hungario

Du informvolumoj

Recenzas Paŭlo Ereno (Nederlando):

Doutor Esperanto, de W. Francini (1926-). São Paulo: Associação Paulista de Esperanto, 1973. 135p. 19cm.

La leganto ne atendu ampleksan kaj dokumentplenan traktadon; ĝi estas malpeza legaĵo, tre rekomendinda ĉefe por gejunuloj; plenkreskaj personoj eble ŝatus iom pli sekan kaj malpli melodraman tekston. Sed, en sia branĉo la libro estas sukcesa.

La stilo estas flua kaj facila, kaj mi tuj pensis, ke se oni tradukus ĉi tiun verkon al Esperanto, ĝi fariĝus tre utila por progresantoj, kiuj samtempe plibonigus sian lingvoscion kaj informiĝus pri iomo de la Esperanta historio.

Mi nur bedaŭris, ke la aŭtoro, tiel detala ĉe la komenco — li eĉ elcerbumas imagajn dialogojn kun tre bona sukceso — fariĝis tro konciza ĉe la fino. La lastaj jaroj de la vivo de Zamenhof malaperas en nebulon! Estas dezirinde, en eventuala nova eldono, plilarĝigi la koncernajn ĉapitrojn. Tiel la libro fariĝus duoble pli leginda ol ĝi jam estas.

Prezo: 5,10 (por Nederlando 5,30) gld., plus sendokostoj 10%.

Esperanto sem preconceitos, de Walter Francini (1926-). São Paulo: Associação Paulista de Esperanto, 1976. 189p. 21cm.

Jen leginda libro por ĉiuj, kiuj sin okupas pri la disvastigo de la Internacia Lingvo kaj ĉiutage renkontas diversajn kontraŭdirojn kaj antaŭjuĝojn. Verkita originale en Esperanto, nun tradukita al la portugala de la aŭtoro mem, ĝi estas altvalora kontribuo de Brazilo al la Esperanta literaturo. Konsiderante la relative malgrandan amplekson de la verko, estas surprize kiom multe da informoj la aŭtoro sukcesis kondensi. Krom ekzameni laŭlitere dekojn da senbazaj antaŭjuĝoj pri Esperanto kaj refuti ilin, la aŭtoro donas informojn pri UEA, pri la Movado ĝenerale, belajn tradukojn de Esperantaj poeziaĵoj, komparojn inter la portugala kaj Esperanto, esprimojn de konataj internaciaj eminentuloj favoraj al Esperanto, kelkajn brazilajn leĝojn favorajn al Esperanto kaj plurajn aliajn interesaĵojn.



La stilo estas simpla, preskaŭ konversacia. La aŭtoro tre logike kaj konsekvence prezentas siajn argumentojn, montrante al la kontraŭuloj, ke la sola bazo por kontraŭstari la internacian lingvon estas la antaŭjuĝoj mem!

La aŭtoro foje nomas Esperanton "Brasília de la lingvoj" (celante la ĉefurbon de Brazilo), kio ĉe ne-brazilanoj elvokas ne nur la bildon de moderneco, sed ankaŭ tiun de artefariteco. Sur la p. 62 li diras, ke *Fundamento* kaj *Krestomatio* devas esti "la Biblio" (?) de esperantistoj. Francini tiel peketas kontraŭ la *Principaro de Frostavallen* (ĝi enestas la verkon). La statistikaj pri la plej parolataj lingvoj (p. 86) ŝajnas absurde malaktualaj. La aserto, ke formante la vorton "bopatrino" el "patrino", Esperanto "memorigas pri la respekto, kiun oni havu por bopatrino" sonas strange kaj senbaze. Krome, pritraktante la rilatojn inter spiritismo kaj Esperanto, la aŭtoro ne kaŝas sian admiron pri tiu doktrino; tio ne estas mem malbona, sed kiam la aŭtoro transskribas poeziaĵojn de "spiritoj", mediume ricevitaĵojn, li ŝajne iom forgesas, ke tiaj peze ŝarĝitaj temoj prefere estu prezentataj en la doktrina kunteksto; ĉi tie, eble, la aŭtoro senprudente lasis sin gvidi de la populareco kiun spiritismo ĝuas en Brazilo. Sed, se la leganto sukcesos "malsalti" ĉi tiujn aspektojn, la verko fariĝos tre utila, instrua legaĵo.

Plivarmigi retorton

Recenzas Vilmos Benczik (Hungario):

Mozaiko Tokio, de Yagi-Nihei. Kioto, L'Omnibuso, 1975. 113p. 19cm.

La verko de tiu ĉi debutanta japana originala novelisto havas du vizaĝojn. Kaj estas bonŝance, ke ankaŭ la recenzisto havas du okulojn, el kiuj unu povas ĝojradii, dum la alia ne povas kaŝi la malĝojon.

Mozaiko Tokio estas rakont-ĉeno pri la vivo de tokianoj. Ne temas en ĝi pri ekzotikaj "aziaĵoj", sed pri la ĉiutaga simpla vivo de simplaj homoj. La unuopajn historietojn kunligas fakte nur tiu komuneco kaj la aminda, strangeta ĉefrolulo, s-ro Molkoro.

Nu, sekante ĝin ni komencu per la amara pilolo (por la aŭtoro). Lia lingvouzo estas ege malglata, malegala; verŝajne liaj konoj pri la stilefiko de multaj vortoj estas ne sufiĉe firmaj. Tiu konstato rilatas precipe neologismojn, kiuj superabundas en lia teksto, kies naturo — ja temas pri verko iom felietona, taglibreca, do esence senartifika — entute ne toleras neologismojn. Ĝenas ankaŭ la ioma ŝvitodoro kaj artefariteco, kiu spiras el la frazoj: Yagi-Nihei videble ne vere regas Esperanton.

Tamen, li havas senduban prozverkistan talenton, eble pli fortan, ol multaj niaj aktivaj prozistoj. Elstaras aparte lia bonega kapablo observi kaj trafte priskribi malgrandajn, ŝajne grizajn eventojn de la vivo, kaj li eliminas el tiaj ŝajnaj plataĵoj juvelojn. Lia perceptemo estas preskaŭ senlima, kaj tio ege riĉigas la mikrostrukturon de la verko.

Estas alia laŭdinda eco, kiun mi povus nomi "epika disciplino": la aŭtoro neniam cedas al la tento filozofumi pri la priskribitaj eventoj, neniam li tro-komentas ilin, sed restas ĉiam nur ties fidela "kronikisto". Ne ofta afero en nia literaturo.

Tamen, tiu sinteno ne rezultigas, ke la tuto estas iasence malvarma, ĝene objektivema. Fakte el ĉiu verk-ero sentiĝas la amo de la aŭtoro al la priskribitaj personoj, precipe al la ĉefrolulo, s-ro Molkoro, sed ĉio ĉi realiĝas per metodoj **nerekta**j, kiel cetere estas normale en beletraĵo ĝenerale (sed ne ĉiam en Esperanta). Tamen, iom pli severa redakto de la **tuto** fortigus la efikon de la verko. Se Yagi-Nihei iom plivarmigos sian retorton tiel, ke la rigidema vortmaterialo bone fandiĝu kaj obeeme plenigu la ŝablonojn, kiujn lia plumo ĉizas por ĝi, li povos eniri la vicon de niaj plej bonaj prozistoj.

Prezo: 10,80 (por Nederlando 11,23) gld., plus sendokostoj 10%.

Scienca kaj bonstila

Recenzas Tazio Carlevaro (Svislando):

Fundamentoj de psikologio, de C.J. Adcock. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1976. 99p. Ofsetita manuskripto. 30cm.

Jen finfine science altnivela verko, kiu respektas sian promeson. Probable nesciencisto esperantista ne imagas, kiel bonvenaj estas tiaj bonstilaj, science redaktitaj libroj, kiuj ege antaŭenigas la vortaron kaj la stilon de Esperanto en scienca kampo. Kaj psikologio estas kampo esperantlingve praktike neplugata (kun kelkaj esceptoj: kiel libreto de Charles Baudouin, kaj eble kelkaj aliaj).

La sinteno de Adcock rilate psikologion estas pragmatika. Lia difino estas duba, kaj laŭ mi la epistemologia kampo de psikologio estas malbone limigita (ĝi fakte devus esti scienco inter neŭrofiziologio kaj sociologio, sed ĝis nun neniu povis ĝin difini kontentige unudirekte, kaj fiksi definitivan ĝeneralan metodologion kaj senkontraŭdiran hipotezaron). **Intuicie** ĝi devas ekzisti, sed scienteorie ĝia rolo kaj ĝia statuso estas pridiskutataj.

Kiel ajn apriorie (sed pragmatike tre utile), la aŭtoro unue pritraktas la tri (interpenetrantajn) retojn, kiuj konsistigas la homan estaĵon: la celadan, la perceptan kaj la kognitivan* strukturojn.

Inter la biologia kaj la sociologia niveloj de homa ekzistado, Adcock starigas (enpsikan) funkciadon de speco de specio-konservaj kaj individu-konservaj instinktoj (por kiuj li uzas la tre utilan esprimon

"urĝoj", aŭ prefere: "erĝoj"), kiujn kontraŭstaras la ekzisto de frustrado.

En la homo ekzistas heredaj elementoj, kaj sociaj elementoj (kies enpsikiĝo dependas de la lernado). Li analizas el tiu vidpunkto la rolon de la percepto, percepto-organiziĝo kaj penso. Ankaŭ la afektivan psikosistemon li analizas el tiu vidpunkto. Fine tre valoran esploron li dediĉas al la problemo de la rilato inter determineco kaj libervolo ĉe la homo.

La aŭtoro certe apartenas al difinita skolo, sed li klopodas plej senpartie kaj senantaŭjuĝe prezenti ankaŭ tezojn kontrastantajn kun la propraj.

Probable, manko estas la absoluta foresto de la evoluo-psikologio, kiu estus povinta certe pliklarigi kelkajn nociojn, kiuj en la verko prezentiĝas kvazaŭ sentempaj monadoj.

Kiun legantaron celas ĉi tiu verko? Sendube ĉiun mezintelligentan (kaj intelligentan) esperantiston, kiu volas plilarĝigi sian horizonton. La libro estas facilmaniere verkita: tamen ties lego postulas atenton kaj koncentrigon. Tre bonvena, libro-fine, estas malgranda vortaro el teknikaj vortoj.

Prezo: 18,00 (por Nederlando 18,72) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Adamajoj, E. Lanti. Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1977. 54p. Mimeo. 21cm. Elektitaj artikoloj (1921 – 1946) de la fondo de SAT. **Prezo:** 2,70 gld.

Amo per proverboj, A. Azevedo (1855-1908). El la portugala trad. A. Couto Fernandes (1920). Laroque Timbaut: La Juna Penso, 1977 (3a eld.). 21p. Mimeo. 15cm. Unuakta teatraĵo. **Prezo:** 0,90 gld.

De tent' al tento 2 (1975). 31p. 13cm. Dua kajero de "travestiitaj kantoj". **Prezo:** 0,90 gld.

Ĉunhjang; Koreaj Rakontoj. Esperantigis (1975) Cho Sung Ho. Seŭlo: Rondo Folioj, 1976 (2a eld.). 39p. Ilus. 19cm. Tri rakontoj kun listo de klarigoj i.a. de novaj vortoj. **Prezo:** 3,60 gld.

Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia (1898), L.L. Zamenhof. Tokio: Tokia Esperanto-Kooperativo, 1976. 64p. 18cm. **Prezo:** 3,— gld.

Gaja forĝisto, La, Hermann Schmid. Augsburg: La aŭtoro, 1976. 24p. Ilus. 21cm. Simplaj versaĵoj humuraj. **Prezo:** 4,80 gld.

Internacia Lingvistika Simpozio, Kumrovec 1975. Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1976. 257p. 20cm. Kontribuadoj de Szerdahelyi, Čečuk, Duc Goninaz, Gorjan, Frank, Vrančić, Münnich kaj Tišljär. **Prezo:** bind. 33,90; broŝ. 29,70 gld.

Rimleteroj, M. Boulton kaj W. Auld. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1976. 93p. 15cm. (ISBN 0 9505323 0 4). Unika kolekto de korespondataĵoj en versoj de du el niaj plej elstaraj verkistoj. **Prezo:** 4,50 gld.

Zur Plansprache Esperanto, H. Behrmann. Paderborn: Institut für Kybernetische Pädagogik, 1975. 21p. Mimeo. 30cm. **Prezo:** 5,40 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la **minimuman mendosumon de 15,— guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimуме 3,— gld.**

* **Kognitiva sistemo:** Per nia perceptado kaj pensado ni konstruas reprezentaĵon de la mondo, kiu, kiel vasta mapo, povas gvidi nian agadon. Tiu kompleksa mensa konstruaĵo nomiĝas **la kognitiva sistemo**.

33a INTERNACIA JUNULARA KONGRESO
Poitiers (Francio) 1977 08 09 – 08 16
Adreso: Junulara Esperantista Franca Organ-
izo, 4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris,
Francio.

Parizo post Poitiers

LA ORGANIZANTOJ de la 33a Internacia Junulara Kongreso de TEJO (vidu detalojn pri ĝi en nia decembra numero, p. 204) anoncas ankaŭ junularan postkongreson, kio estas novaĵo rilate TEJO-kongresojn. Respektante la deziron de multaj vizitontoj de la 33a IJK, la organizantoj rezervos lokojn en junularaj domoj de Parizo por kelktaga restado en la franca ĉefurbo. Helpe de lokaj esperantistoj en Parizo oni klopodos fiksi apartan programon (turisman) por tiuj, kiuj volas pasigi 3 ĝis 6 tagojn en Parizo, kontraŭ 24 ĝis 38 francaj frankoj tage. Necesas tamen, ke oni kiel eble plej baldaŭ anoncu sin al la kongresa adreso (v. ĉi-supre) kaj antaŭpagu 20 francajn frankojn aŭ 15 internaciajn respondkuponojn.

Aliĝiloj por la 33a IJK estas haveblaj ĉe la kongresa adreso kaj ĉe la Centra Oficejo de UEA. Al la samaj adresoj estas pageblaj la kongreskotizoj (listo en nia decembra numero).

Laborbrigado

JUGOSLAVIO havas longan tradicion en la organizado de junularaj labortendaroj, kiel oni tion kutime nomas, aŭ junularaj laborbrigadoj, kiel en Jugoslavio tiaj aranĝoj estas nomataj. La unua esperantista junulara laborbrigado funkciis tie en 1958. Sekvis pluraj aliaj ĝis 1968, kiam 120 gejunuloj el deko da landoj laboris ĉe la konstruado de aŭtoŝoseo en la jugoslavia ĉefurbo. Tra la esperantistaj laborbrigadoj en Jugoslavio pasis ĝis nun ĉ. 600 junaj esperantistoj, kiuj dum sia unumonata restado en tiaj brigadoj povis plene familiariĝi kun la Internacia Lingvo, kiu en ĉiuj ĉi aranĝoj estis la oficiala lingvo de la brigada kolektivo.

Por julio 1977, sekcio de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio anoncas novan samstilan aranĝon. Temas pri internacia junulara laborbrigado de ĉ. 60 esperantistoj, laboronta denove ĉe vojkonstruado. Kiel kutime en Jugoslavio, kiam temas pri ĉi tiaj aranĝoj, la esperantista laborbrigado estos nur unu el pluraj dekoj da similaj grupoj, kiuj partoprenos grandan laboraranĝon por miloj da junaj homoj. La



En la laborbrigadoj neblaĵoj fariĝas eblaj: Redakcio de ĉiutaga gazeto en Esperanto (labortendaro de 1964).

organizantoj de la laboraranĝo provizos la partoprenantojn per kompleta prizorgo, inkluzive eĉ de laborvestaĵoj. Post la kutima 6-hora labortago restos amaso da tempo por kultura vivo, perfektigo en Esperanto, lernado de la serbokroata lingvo, provo akiri veturpermeson en speciala kurso tiucela ktp. Ĉar tiaj junularaj laboraranĝoj en Jugoslavio ĝuas aparte grandan prestiĝon kaj ofte malfacilas certigi partoprenon en ili, necesas kiel eble plej baldaŭ anonci sin al la organizanto de la esperantista laborbrigado: Kroatia Esperantista Junulara Asocio, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Laponoj k.a.

SEJU (Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo), kies revuo *Kvinpinto* iam tremigis la internacian junularan Esperanto-movadon, ŝajnas vekiĝi kaj anoncas interesan aranĝon. En Umeå, inter la 4a kaj 12a de junio 1977, SEJU aranĝos Internacian Universitatan Seminarion pri la temo "Laponoj, eskimaj kaj alaskaj problemoj". Proponoj pri programkontribuaĵoj estas bonvenaj. La seminario okazos en la Lapona Instituto de la Universitato de Umeå. Eblos loĝi komforte kaj nemultekoste. Oni antaŭvidas apartajn vojaĝsubvenciojn. Pliaj detaloj ĉe: SEJU, Fack, S-122 04 Stockholm-Enskede, Svedio.

La centa HEJS

LA PLEJ ampleksa kaj multrilate ankaŭ la plej bona bulteno, kiun eldonas landaj sekcioj de TEJO, tiu de la Junulara Sekcio de Hispana Esperanto-Federacio, atingis antaŭ nelonge sian **centan** numeron. La jubilea n-ro de *HEJS-bulteno*, kiel la periodaĵo nomiĝas, estas ŝajne unuafoje kompostita kaj aspektas konvene al sia jubileo. Kiel kutime, ĝi estas enhave riĉa kaj teme varia. Ĉi-foje ĝi alportas ankaŭ tradukon de longa teksto de Jack London fare de la akademiano Fernando de Diego.

**62a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Rejkjaviko (Islando)
1977 07 30 – 08 06**

Alta Protektanto: d-ro Kristján Eldjárn, prez-
idanto de la Respubliko Islando.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando.

Adreso de la LKK: Pósthólf 1081, Reykjavík.

Loĝkostoj nun konataj

LKK jam faris blokajn mendojn pri la necesaj nombroj da litoj en jenaj kategorioj: **Hoteloj** tuj apud la kongresejo aŭ kun bona aŭtobusa ligo; prezoj en dupersona ĉambro, sen matenmanĝo, por ĉiu persono kaj nokto de 49 ĝis 56 gld. **Studenta hotelo** (tuj apud la kongresejo): en dupersonaj ĉambroj po 32,50 gld., sen matenmanĝo, por ĉiu persono kaj nokto. **Gastejoj kaj pensionoj:** Estas rezervitaj ĉ. 200 litoj en la kvartalo de la kongresejo. Prezoj po 32,50 gld. por ĉiu persono kaj nokto en dupersona ĉambro (inkluzive matenmanĝon); 45,— gld. por unupersona ĉambro. **Amasloĝejoj:** Aranĝataj en lernejoj. Prezoj ĉ. 7,50 gld. por ĉiu persono kaj nokto, sen matenmanĝo. Ĝenerale necesos kunporti



Tempo por pli seriozaj ludoj: Sune Kehlet jam aliĝis al la Infana Kongreseto en Islando (v. nian decembran n-ron).

propran dormsakon. Matenmanĝo (kaj aliaj manĝoj) haveblas i.a. en la studenta restoracio en la proksimeco de la kongresejo, kun kapacito de 300 personoj. Eblas ankaŭ tendumi; oni skribu al: Ferðafélag Íslands, Öldugata 3, Rejkjaviko.

Ekskursu komforte — kaj sekure!

Islando estas lando de sovaĝa naturo, kun grandaj vastejoj neloĝataj, aktivaj vulkanoj, gejseroj kaj aliaj spektaklaj naturfenomenoj. La eblecoj por ekskursoj estas konsterne diversaj. Post zorga konsiderado, LKK decidis proponi tri duontagajn, tri samtempajn tuttagajn kaj tri postkongresajn ekskursojn. La duontagaj estos: rondveturo tra Rejkjaviko; suda Islando (fiŝkaptista vilaĝo, gejserejo); Hveragerdi (gejserekspluata centro). Prezoj de 12,50 ĝis 30,— gld. El la tuttagaj, du sekvos la saman vojon ĝis Thingvellir, la fama fondiĝloko de la islanda ŝtato, kaj poste disiros: unu al impona akvofalo ĉe la rando de la montara vastejo, la alia al glaciejoj kaj laŭeble al balenstacio. La tria tuttaga ekskurso celas la regionon de la vulkano Hekla, laste erupciinta en 1970. Prezoj de 42,50 ĝis 55,— gld. La oficialaj postkongresaj aranĝoj konsistos el po du variantoj de vojaĝoj al la norda regiono de Islando kaj al la sudorienta regiono. Iuj komenciĝos en la postkongresa dimanĉo, aliaj en lundo kaj varios de 2 ĝis 4 tagoj. Prezoj ankoraŭ fiksitaj, sed proksimume 100,— gld. tage. Krom la oficialaj postkongresaj ekskursoj, eblas mendi ankaŭ aliajn aranĝojn, ekzemple flugviziton al Gronlando aŭ 12-tagan geologian esploradon, pere de la Islanda Turisma Oficejo.

Ankaŭ la vojaĝo mendebla ĉe la UK

La kongresanoj havos la eblecon mendi la alflugon pere de la Kongreso mem aŭ pere de la landa kotizperanto. Tio montriĝis rekomendinda pro la fakto, ke la vetureblecoj al kaj de Islando estas iom limigitaj kaj ke necesis bloke rezervi sidlokojn por la kongresanoj en la regulaj flugoj de la islanda flugkompanio. UEA devis rezigni pri la ideo organizi ĉartoflugojn ekde Parizo aŭ Amsterdam. La kongresanoj el la eŭropa kontinento flugos al Islando ekde Düsseldorf, Frankfurt aŭ Luksemburgo. Prezoj (ankoraŭ konfirmotaj) estos respektive DM 625,—; DM 683,—; kaj el Luksemburgo 987 francaj frankoj aŭ ĉ. 493,— gld. Ĝenerale necesos alflugi grupe en fiksitaj datoj (tuj antaŭ la UK), sed ĉiu povos libere elekti sian revendaton.

Aliĝoj kreskas rapide

En la momento de redakto (la 16an de decembro) la nombro de kongresanoj proksimiĝas al 550. Francio (kun 78 aliĝintoj) estas la plej kongresema lando ĉi-jare, sekvate de FR Germanio (54).

Aŭstrio

- Ĵus aperis la lasta — 12a — kajero de la instruserio "Esperanto sen peno", kiun prizorgis Aŭstria Esperanto-Movado (AEM). Estas aparte menciinda la fakto, ke la presigon de la serio financis la plej granda aŭstra entrepreno Vöest — Alpine Montangesellschaft.

Britio

- La 26an de novembro, en unu-hora programo por virinoj, BBC-Radio 4 donis 15 minutojn al inventinto de nova "internacia lingvo", nomata "Euroglossa". Prezente sian inventaĵon, kiun aŭskultis milionoj da homoj, la aŭtoro (lingva fakulo de la Universitato de Bristol) diris, ke "Esperanto fiaskis". Tiu deklaro incitis multajn aŭskultantojn kaj rezultigis amason da protestleteroj. Tio igis la redaktoron de la programo en posta lundo menci la reagojn kaj kelkajn tagojn poste ankaŭ legi tri el ili. Tiuj leteroj menciis Esperantajn kongresojn, literaturon, radio-elsendojn, lernejan kaj universitatan instruadon, britan parlamentan E-grupon ktp. En la fino, la anoncistino komentis: "Ŝajnas, ke Esperanto ne fiaskis, sed estas en tre bona sanstato." Ankoraŭ en la sekvanta lundo, en la sama programo (ĝi okazas ĉiutage krom sabato kaj dimanĉo) oni legis plian favoran leteron.

Egiptio

- Salutante nome de Egiptio en la Solena Inaŭguro de la 61a UK en Ateno, d-ro Tadros Megalli, egipto longtempe vivanta en Eŭropo, promesis, ke li baldaŭ reiros al sia patrolando kaj klopodos vigligi la neniam tre grandan Esperanto-agadon en tiu lando. D-ro Megalli iris tien komence de oktobro 1976. Post kelksemajna restado kaj klopodo, li reiris al FR Germanio (kie li nuntempe vivas). Liaj kontaktoj en Aleksandrio ŝajnas esti fruktodonaj. Li faris tie prelegon en granda junulara organizaĵo, kiun verŝajne sekvos Esperanto-kurso, gvidota de loka esperantisto s-ro Ahmad Khadr (14 Siuk el Nasr, Menshia, Alexandria). D-ro Megalli intencas poste denove reiri al Egiptio.

Brazilo

- En la plej vasta sudamerika lando funkcias tri tutlandaj esperantistaj organizaĵoj: Brazila Esperanto-Ligo (fondita en 1907, longtempe aliĝinta landa asocio de UEA), Kultura Kooperativo de Esperantistoj (fondita en 1951, nuna aliĝinta landa asocio de UEA) kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto (fondita en 1974). *Brazila esperantisto* (n-ro 748-750), organo de la plej malnova el la tri organizaĵoj, traktas la nunan situacion de la Movado en Brazilo kaj konkludas, ke la ekzisto de tri tutlandaj organizaĵoj estas unu el la ĉefaj malhelpoj por la movado.

Bolivio

- Post la anonco pri novaj movadaj iniciatoj en tiu sudamerika lando (v. nian novembran n-ron, p. 193), ni eksciis, ke la Internacia Lingvo daŭre gajnas novajn adeptojn en Bolivio. Antaŭ nelonge en la Universitato de La Paz komenciĝis enkonduka Esperanto-kurso por ĉ. 30 gestudentoj.

Aŭstralio

- Korespondado povas doni mirindajn rezultojn. Plia pruvo pri tio estu la Esperanto-Klubo de Morwell (Victoria), Aŭstralio, kiu jam plurajn jarojn dissendas siajn esperantlingvajn leterojn tra la tuta mondo. Nin atingis "Grupa letero" n-ro 48, de la 15a de novembro 1976. Ĝi iris al 80 personoj, vivantaj en 40 landoj kaj parolantaj 25 diversajn gepatrajn lingvojn. Kompreneble, al la klubo en Morwell revenos 80 leteroj en unu sola lingvo — Esperanto — kaj ili enhavos minimume 80 novaĵojn el ĉiuj anguloj de la terglobo. Ne estas

Svislando

- La Perfekta Centro por la Ĝeneva Instruistaro starigis komence de novembro Esperanto-kurson, kiun partoprenas 12 instruistoj kaj gvidas s-ro Claude Piron.

Soveta Unio

- S-ro N. Starodubĉev (A.k. 618, SU-340092 Doneck, Soveta Unio) informas, ke Esperanto-kursoj en tiu urbo funkcias ĉe la Urba Scienca Biblioteko, Domo de Kulturo kaj Palaco de Pioniroj. Krome, por la studjaro 1977/78 oni planas Esperanto-fakon ankaŭ en la loka universitato. La biblioteko de la loka klubo bonvenigus Esperantajn literaturaĵojn.

Francio

- Ĉar Francio apartenas al la landoj kun la plej multnombra UEA-membro, ankaŭ la delegita reto tie estas unu el la plej densaj. Laŭ statistiko de la ĉefdelegito, s-ro J. Guillaume, en 1976 francaj UEA-delegitoj plenumis 335 delegitajn servojn kaj akceptis 365 eksterlandajn gastojn. Estas interese, ke 39 delegitoj organizis Esperanto-kursojn dum la pasinta jaro.



do mirinde, ke pri la grupa korespondado entuziasmiĝis ankaŭ la nova Esperanto-klaso en la loka Moe High School, kiu kun sia instruisto I.T. Maddern pozas sur nia foto.

Lingva problemo

- La Komisiono de la Eŭropa Komunumaro anoncis la organizon de la Tria Eŭropa Kongreso pri Inform-Sistemoj kaj -Retoj. Ĝi okazos inter la 3a kaj 6a de majo 1977 en Luks-emburgo. La temo de la kongreso estas "Kiel venki la lingvan baron". En ĝia kadro oni traktos i.a. jenajn demandojn: Instruado kaj uzado de la lingvoj en la Eŭropa Komunumaro; Semantiko, terminologio kaj leksikografio; Problemoj de tradukado kaj interpretado; Inform sistemoj, multlingvaj vortkatalogoj ktp.; Aŭtomata tradukado. UEA jam estas en kontakto kun la organizantoj.

Informado

- En kunsido, la 4an de decembro 1976, Belga Esperanto-Federacio kaj Nederlanda Esperanto-Centro interkonsentis estonte kunlabori sur la kampo de la informado. Rezulte de tiu interkonsento, la nederlandlingva eldonaĵo *Esperanto panorama* (redaktoro P. Peeraerts) estonte celos ne nur la nederlandlingvan parton de Belgio, sed la tutan nederlandlingvan regionon, inkluzive do de Nederlando mem.

Universitatoj

- Laŭ informilo de la Universitato Eötvös-Loránd en Budapeŝto, ankaŭ en ĉi tiu jaro eblos aliĝi al la studoj de Esperanto ĉe prof. d-ro I. Szerdahelyi. Eksterlandanoj povas aliĝi post sukcesaj unujara kurso pri la hungara lingvo kaj akcepta ekzameno ĉe la Universitato. La studoj daŭras kvin jarojn. Esperantlingvaj informiloj estas haveblaj ĉe: Eötvös-Loránd Tudományegyetem Bölcsészettudományi Kar, P.f. 107, H-1364 Budapest, Hungario.

Lingvoj

- Dum la lastaj jaroj oni plurfoje aŭdis pri planoj enkonduki la latinan alfabeton en Ĉinio. Komence de aŭgusto 1976 oni notis ĝian unuan oficialan uzon tie. Temas pri la nord-okcidenta regiono Hingiang, kie la alfabeto devus anstataŭi la skribojn de la popoloj ujgura kaj kazaĥa (7,5 milionoj). Atentigante, ke la latinigo en Ĉinio daŭros dum pluraj generacioj, la prezidanto de la ĉina Akad-

emio de Sciencoj Kuo Mo-ĵo diris, ke poste "la uzo de la ĉinaj ideografoj estos, kiel ĉe la antikva greka, latina kaj sanskrita, limigita al malgranda nombro de specialistoj."

Periodaĵoj

- Komence de decembro 1976 aperis n-ro 14 de *Internacia jura revuo*, kies redaktadon antaŭ nelonge transprenis prof. d-ro Ivo Lapenna. La belaspekta (teknika prizorgo: T.A. Høeg, Norvegio), 48-paĝa kaj-ero plejparte estas dediĉita al "Kompensoj pro damaĝoj kaŭzitaj per akcidentoj", laŭ la juroj de diversaj landoj. Ankaŭ parto de la n-ro 13 estis dediĉita al tiu temo.

Unesko

- Honore al la 30-jara ekzisto de Unesko, la 30an de novembro 1976 s-ro Van der Hoeven, multjare laborinta kiel evoluiga konsilisto en Afriko, parolis (kun diapozitivaj) por la amsterdamaj esperantistoj pri la laboro de la specialigitaj organizaĵoj de UN en la Tria Mondo.

Numismatiko

- Unu el niaj regulaj kunlaborantoj, s-ro M. Delcourt, fakdelegito pri numismatiko en Tourcoing, Francio, regule aperigas esperantlingvajn informojn pri moneroj en la plej grava tiufaka franca revuo *Numismatique & change*.

Persone



Bormann

- En novembro 1976, s-ino Elsbeth Bormann (v. la foton), estrarano de Germana E-Asocio kaj gvidanto de la Komisiono de UEA pri Virina Agado, vizitis plurajn funkciulojn en la politikaj kaj registaraj rondoj de la ĉefurbo de FR Germanio. S-ino Bormann interparolis pri Esperanto-agado en la oficejo de la federacia kanceliero, en la sidejo de la opozicia partio CDU, en la radio-konsilantaro kaj en la Unesko-komisiono de FR Germanio. Inter la temoj priparolitaj aparte elstaras interesiĝo de la germana Social-Demokrata Partio kunvoki esperantistan konferencon de socialismaj partioj kaj preteco de la Unesko-komisiono ankaŭ finance subteni eventualan konferencon pri virina agado.

Piron

- Claude Piron, profesia interpretisto kaj lekcianto en la Universitato

de Ĝenevo, komence de oktobro 1976 skribis ampleksan leteron al la fama prof. Etiemble, lekciisto pri la kompara literaturo en la Universitato de Parizo. Piron en sia letero sagace argumentis kontraŭ mencio per kiu Etiemble, en lastatempa eseo, demandsignis la belecon de Esperanto. Meze de oktobro prof. Etiemble — li estas aparta nocio, kvazaŭ memstara skolo sur la kampo de la kompara literaturo — reskribis al Piron kaj, pledante por internacia komunikilo "kiu ne subtenas ajnan imperiismon", i.a. diris: "Fakte, aliaj esperantistoj jam skribis al mi samele kaj de nun mi ne kontraŭstarus al tio, ke oni universale uzu Esperanton."

Nekrologoj

ANTAL KOÓS

La 28an de septembro en Budapeŝto forpasis Antal Koós (1911-1976). Dum multaj jaroj li estis sekretario de Hungara Esperanto-Asocio, kaj en la jaro 1966, en Budapeŝto, li funkciis kiel sekretario de la Loka Kongresa Komitato de la plej multnombra UK en la postmilita periodo.

MAURICE CLAVEL

En Valence, Francio, la 16an de novembro mortis Maurice Clavel (1910-1976), membro de UEA depost 1938 kaj delegito ekde 1946.

CHRISTIE W. ROBERTS

Post 20-jara membreco kaj preskaŭ same longa servo kiel delegito de UEA, en Kelowna, Brita Kolumbio, Kanado, forpasis antaŭ kelka tempo Christie W. Roberts (1905-1976).

ARTUR GITZINGER

Esperantisto ekde 1920 kaj delegito de UEA dum la lastaj dudek jaroj, en Solingen (FR Germanio), la 4an de oktobro forpasis Artur Gitzinger (1900-1976).

JAUME VILADOMS VALLS

En Sabadell, Hispanio, la 6an de oktobro mortis Jaume Viladoms Valls (1898-1976), fakdelegito de UEA kaj unu el la plej elstaraj movadaj aktivuloj en Sabadell.

Nova Librolisto

Multaj legantoj de nia revuo kaj precipe la klientoj de la Libroservo de UEA scivolas pri nova eldono de la *Librolisto de UEA*. En la Novjara Mesaĝo (p.1 de ĉi tiu n-ro), vi povas vidi, ke oni planis la eldonon de la libro-katalogo en 1977. Efektive, la laboroj tiurilate jam bone progresis kaj la kompleta revizio (kaj rekomposto) de la *Librolisto* estas grandparte pretita. Ĝi aperos fine de marto 1977 kaj aŭtomate iros al ĉiuj individuaj membroj de UEA.

Marček, FD (gastigado, turismo), Martin; Libor Křivánek, FD (SOS-aŭtoservo), Písek; Oldřich Kníchal, FD (ĵurnalismo), Praha. FRANC: Simone Humm, D, Avignon. FRG: Josef Lutz, FD (inĝenierado, SOS-aŭtoservo), Bamberg; Florin Caragea, D kaj FD (arkitekturo, turismo), Frankfurt/Main; Goar Engeländer, FD (filatelo, folkloraj kantoj, longdistanca kurado), Paderborn; Werner Bernhardt, FD (komerco), Reinbek; Johannes Windisch, D, Stuttgart; Berthold Fischer, FD (turismo, SOS-aŭtoservo), Westerland. ISL: Olafur Halldorsson, D, Akureyri; Jon Hafsteinn Jonsson, VD, Akureyri; Jon Ingyar Jonsson, JD, Akureyri; Gisli Gudmann, FD (pentroarto), Akureyri. MALAG. RESP.: Eugène Raveloson, FD (instruado de Esperanto, turismo), Tananarive. NED: f-ino Johanna C. van Tinteren, D, Amersfoort. SVIS: Max Kübler, D, Radelingen. US: Milton E. Davis, FD (religio: adventismo, gesto-lingvoj de surduloj), Angwin; Mark Mandel, FD (lingvistiko), San Francisco.

Oficiala Informilo

N-ro 503, 1976 11 30

KOTIZŜANĜOJ POR AŬSTRALIO

Rezulte de la lastatempa devaluto de la aŭstralia dolaro, ŝanĝiĝis la tarifo de UEA-kotizoj por Aŭstralio por 1977. Anstataŭ la sumoj publikigitaj en la oktobra *Esperanto* (p. 175) validas la samaj sumoj, kiel por Usono, t.e. ekzemple MA = \$19. Nur la sumo por aerpoŝta ekspedo de la revuo diferencas de la usona. Por Aŭstralio ĝi kostas \$7,50.

SOCIETO ZAMENHOF 1976

BRAZ: 219 Elmo Pereira Nunes.

SOCIETO ZAMENHOF 1977

BELG: 24 J. Bernaerts-Toussaint. FRG: 25 Louis Beaucaire; 26 Maria Laade (pagis 200,— gld.); 27 M. von Waldowski; 28 W. von Waldowski. KAN: 29 Dorothy M. Hawley (pagis 500,— gld.); 30 P.W. Trubey. NOR: 31 Agneta Anjer; 32 Ludvig Anjer; 33 Pepita de Caspary. SVIS: 34 Gerard Cool; 35 Florence Côté-Cool; 36 Alice Eberhard; 37 Walter Sonderegger; 38 Frieda Welter. US: 39 Marta Evans. BRIT: 40 G.B. Tordoff. DAN: 41 P.O.P. Andersen; 42 J. Pedersen. KAN: 43 Kirk Crockett; 44 Olga du Temple; 45 W.G. du Temple. SVED: 46 Ragnar Hjorth; 47 Leif Holmlund; 48 A. Johansson; 49 Henrik Karlsson; 50 Dagny Lundgren; 51 G. Nylin; 52 Folke Pettersson; 53 Jan-Olof Svensson.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA, ni publikigas la nomojn de la nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1977 03 15 neniuj membroj pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

BRIT: Joseph S. Gavan, D, Blackburn; J. Adrian Oates, VD kaj FD (SOS-aŭtoservo), Chester; Walter H. Hawkins, D, Gloucester; Frank J. Rogers, D, Ilford. ĈEĤOSL: Stano

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1976:

BRIT: Darwen; Lytham Saint Annes; Peasedown St. John. FINN: Lahti, D. FRANC: Valence, D. FRG: Berlin, FD (SOS-aŭtoservo), FD (ekonomio); List; Löhne. ISL: Laugvatni. PORT: Lisboa, FD (lingvistiko). US: Bartlesville; San Diego, FD (juraj kaj advokataj aferoj).

Amikiĝi kun libroj

La Volontula Servo de UEA serĉas novan kandidaton por la Libroservo de UEA ekde marto 1977, kiam finiĝos la servoperiodo de la nuna volontulo.

La taskoj konsistas plejparte en traktado de mendoj pri libroj kaj abonoj, fakturado, kontrolado de la stokoj kaj laŭbezona remendado. Persono kun literaturaj, bibliografiaj kaj librotenaj aŭ matematikaj interesoj plej taŭgas. Petu demandaron ĉe la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam.



ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 7

(pri la demando v. nian decembran numeron, p.211)

Valdemar Langlet, pioniro de la sveda Esperanto-movado, edziĝis al Signe Blomberg, kun kiu li konatiĝis per Esperanto, la 3an de aŭgusto 1899, en Åbo (Turku), Finnlando. Tiutempe Finnlando estis parto de la rusa imperio.

Langlet naskiĝis en 1872 en Lebro, Svedujo, kaj esperantistiĝis en 1890. Dum li ankoraŭ estis universitata studento, li kunfondis en 1891 la Esperanto-grupon en Uppsala. Post la ĉesigo de la revuo *La Esperantisto*, Langlet helpis lanĉi la novan internacian gazeton, *Lingvo Internacia*, en 1895. Dum la sekvaj jaroj Langlet faris poresperantajn vojaĝojn tra Rusujo, Turkujo, Rumanujo, Aŭstro-Hungara Imperio kaj Germanujo.

Post la morto de sia unua edzino en 1921, Langlet edziĝis al Nina Borovko, en Moskvo en 1925. Ŝi estis la filino de la esperantista amiko de Langlet, Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko (1863-1913), konata al esperantistoj pro la fama letero, kiun d-ro Zamenhof skribis al li pri la deveno de Esperanto.

Ankaŭ Borovko "edzperantistiĝis". Lia edzino estis la rusa esperantistino Antonina Justinovna Ĉajkovskaja, kiu akompanis Langlet kiel Esperanto-gvidistino dum lia vizito al Krimeo en 1895.

DEMANDO 8

(la respondo aperos en nia februara numero)

D-ro Zamenhof plurfoje havis la malgajan taskon verki nekrologojn pri forpasintaj esperantistoj de la frua periodo de la historio de Esperanto. Ĉu vi povas identigi surbaze de la sekvaj citaĵoj kvin virojn, kiuj ludis gravan rolon en la disvastigo de Esperanto?

a) "Antaŭ kelkaj semajnoj mortis en Nürnberg post longa kaj malfacila

suferado ... unu el la plej varmaj kaj energiaj amikoj de nia afero. ... La mortinto estis la unua, kiu donis antaŭpuŝon al nia afero en Germanujo. ... per vasta korespondado kaj dissendado de verkoj li serĉis amikojn por nia afero. ..."

La Esperantisto, 1890

b) "Ĝus mi ricevis la malĝojan sciigon, ke vespere la 19-an de Februaro ... mortis en Varsovio (de malsano de koro) unu el la plej fidelaj amikoj de nia afero. ... [li] estis la ĉefa kaj plej laborema reprezentanto de nia afero en Varsovio kaj entute en Polujo. Li tradukis en lingvon polan la propagandan broŝureton kaj penadis ĉiam vastigadi ĝin kiel eble plej multe ..."

Lingvo Internacia, 1897

c) "El Essen en Germanujo mi ricevis la tre malĝojan sciigon, ke la 7-an de novembro ... mortis, en la aĝo de 63 jaroj... Al la novaj esperantistoj mi diros nur mallonge, ke sen ... nia afero nun eble jam de longe ne ekzistus. Antaŭ 10 jaroj la stato de nia tiam ankoraŭ tre juna afero estis tre malbona; ekzistis neniam rimedoj, por ion fari, kaj nia sola tiama gazeto devis ĉesi eliradi. ... [li]prenis sur sin la tutan finan

ŝarĝon de nia gazeto, ne sole prenis sur sin ĉiujn elspezojn, sed difinis ankaŭ el sia poŝo salajron por la redaktoro ..."

Lingvo Internacia, 1901

ĉ) "Foriris unu el la plej gravaj esperantistoj, falis unu el la plej ĉefaj niaj kunbatalantoj. ... Antaŭ pli ol unu jaro, tuj post la Bulonja kongreso, li grandparte partoprenis en la fondo de la "Centra Oficejo", kaj ankoraŭ en la Ĝeneva kongreso ... En la lasta tempo li fervore laboris, por igi la francan registaron, enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn."

La Revuo, 1906/07

d) "En la germana banloko, kie mi estis, atingis min tute subite la doloriga sciigo pri la morto de tiu, pri kiu ni nun ĉiuj funebras. ... Tuj post sia apero li komencis propagandon viglan, kiu ĝis tiam ne estis multe konata en Esperantujo. Li altiris al nia afero gravan firmon, kiu al la tiam ankoraŭ malforta Esperanto donis potencon apogon kaj fortan puŝon antaŭen. ... En Parizo li fondis grupon, kiu per sia bonega organizo kaj vigla laborado baldaŭ fariĝis imitinda modelo por ĉiuj aliaj grupoj esperantistaj en la mondo."

La Revuo, 1913/14

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

LA TORNISTRO — bona distro —, duonjara revuo, literaturaĵoj, diversaj. Abono 1976-77-78: 12 gld. Antaŭa trijara kolekto: 12 gld. Mendu ĉe UEA.

38-jara instruisto de angla lingvo baldaŭ ekgvidos Esperanto-grupon de junaj leningradaj aktoroj kaj tial serĉas kontakton kun eksterlandaj esperantistoj el la teatra fako. Bv. skribi al: Viktor Gohštejn, ul. Neĵinskaja 4, kv. 113, SU-194156 Leningrad, Soveta Unio.

24-jara bibliotekistino: Zora Velĉeva, str. K. Ohridski 11, BG-5300 Gabrovo, Bulgario, deziras korespondi tutmonde.

Malnovaj Esperanto-revuo interesas min: Ramon Molera, Moyá (Barcelona), Hispanio.

Pri arto deziras korespondi 20-jara István Rajkai, Hevesi Gyula 60.III. 15, H-1156 Budapest, Hungario.

30-jara instruistino korespondus tutmonde: Libuše Klaudová, Jučinská 13, CS-74258 Příbor, Ĉeĥoslovakio.


Ŝekspiro, Epifanio (Twelfth Night), trad. William Auld, £1.80 (inkl. sendkostojn). Eldono de KARDO, 16 Woodlands Drive, Coatbridge ML5 1LE, Skotlando. Samadrese: R.L. Stevenson, *Forkaptita* (Kidnapped) £2.25; Eŭripido, *Bakĥantinoj* £1.20; A. Goodheir, *Merlo sur Menhiro*, poemaro, £0.85.

Disaj numeroj Esperanto 1956-1976, vendas: Ribot, rue Vergne, Marmande, Francio; ĉiu: 1 franko + afranko.

Volas korespondi: 60-jara verkisto kaj edzino serĉas gekorespondantojn en Italujo, Hispanujo, Aŭstrujo kaj Jugoslavio. George kaj Kathleen Fisher, 16 Clapper's Lane, Bracklesham Bay, Chichester PO20 8JB, Anglujo.

ELEKTITAJ VERKOJ DE MAŬ ZEDONG

(en Esperanto)



LA UNUA VOLUMO ampleksas 17 artikolojn, kiujn verkis kamarado Maŭ Zedong en la periodoj de la Unua Enlanda Revolucia Milito (1924-1927) kaj la Dua Enlanda Revolucia Milito (1927-1937).

622 paĝoj
£0.42

10 x 15 cm.
US\$ 1.05

kun ruĝa plast-kovrilo
gld. 1.90

LA DUA VOLUMO ampleksas 40 artikolojn, kiujn verkis kamarado Maŭ Zedong en la periodo de la eksplodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito en julio 1937 ĝis la repuŝo de la dua kontraŭkomunista alttajo, lanĉita de Ĉiang Kajŝek, en majo 1941.

460 paĝoj
£1.50

15 x 22 cm.
US\$ 3.80

bindita
gld. 6.70

LA TRIA VOLUMO ampleksas 31 artikolojn, kiujn verkis kamarado Maŭ Zedong en la periodo de marto 1941 ĝis aŭgusto 1945, kiam nia lando akiris la finan venkon de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

282 paĝoj
£1.20

15 x 22 cm.
US\$ 3.00

bindita
gld. 5.40

LA KVARA VOLUMO ampleksas 70 artikolojn, kiujn verkis kamarado Maŭ Zedong en la periodo de la Tria Enlanda Revolucia Milito (Aŭgusto 1945-septembro 1949).

440 paĝoj
£1.50

15 x 22 cm.
US\$ 3.80

bindita
gld. 6.70

Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio

Mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA kaj naciaj perantoj aŭ rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Krommenie 1977

23a Internacia Esperanto-Ferio-Semajno
(de la 7a ĝis la 14a de aŭgusto 1977)

La Esperanto-Societo "Unueco" de Krommenie organizas denove IEFS-on. Ni invitas geesperantistojn (ne nederlandajn). La kostoj estos 90 ned. guldenoj po persono.

Petu informojn ĉe s-ino B. v.d. Pol-v. Eijk,
Teresjkovastraat 15, Krommenie, Nederlando.

fariĝu domposedanto

Per aĉeto de akcioj vi realigas novan internacian kulturdomon. — "Esperanto-Centro D-ro Zamenhof". Informojn petu ĉe: s-ro Sudec, Wandsbeker Chaussee 155, D-2000 Hamburg 76.

TRIA INTERNACIA LITERATURKONKURSO

Larius 1977

Esperantlingvaj sekcioj:

Sekcio "B" : libertemaj poemoj originalaj.
Sekcio "C" : poemoj tradukitaj el kiu ajn lingvo.

Por partopreni oni sendu unu aŭ du poemojn, en SES KOPIOJ, el kiuj nur unu kun nomo, adreso, subskribo (tradukaĵoj kun aldona originalo) al jena adreso:

CONCORSO LARIUS, C.P. 80, I-22100 Como, Italio.

Limdato por akcepto: la 15a de aprilo 1977.


Premioj: Diplomoj, pokaloj, ŝildoj, oraj kaj arĝentaj medaloj, pentraĵoj.

PARTOPRENO SENPAGA POR NE-ITALOJ
Elstaraj internaciaj juĝkomisionoj.

Io por diri al ĉiuj?

Anoncu en nia revuo, ĉar ĝin legas minimume 10 000 personoj en 86 landoj tra la tuta mondo. Vidu anonc-tarifon sur la dua kovrila paĝo.

SE VI SERĈAS SERIOZAJN KORESPONDANTOJN, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo), turnu vin al la KORESPONDA SERVO de UEA. Adreso: K.S.M., 12 rue des Jacobins, F-63000 Clermont-Ferrand, Francio.



Facila kaj utila helpo

Pro sia profesia okupiteco, multaj homoj, spite al siaj deziroj, ne sukcesas aktivi en la Movado. Ili tamen estas membroj kaj regule pagas siajn kotizojn al diversaj organizaĵoj. Nu, ankaŭ

tio estas grava helpo al la Movado. Vi eble ne havas tempon varbi novajn membrojn por UEA kaj TEJO, sed vi ja trovos tempon simple disdoni la du belajn informilojn! Mendu do tuj ilin ĉe: UEA, Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002.



HELSINGÖR 1977

(sub la aŭspicio de UEA)

En la Internacia Altlernejo, Helsingör, Danlando, okazos Internaciaj FERIAJ Esperanto-kursoj de la 24a ĝis la 30a de julio 1977. Ni invitas vin ĉeesti kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en vere internacia rondo.

Atentinda estas la fakto, ke la eminenta kaj en la esperantistaj rondoj tre bone konata s-ro Reto Rossetti gvidos la perfektigan kurson. La ceterajn tri kursojn gvidos la samaj instruantoj kiel pasintjare. Kaptu la okazon komenci la lernadon aŭ perfektigi en la Internacia Lingvo. Programo senpage havebla ĉe: s-ino Eva Langkilde, Ingemannsvej 18, DK-3000 Helsingör, Danlando



"Post nun jam dufoja tralegado de la libro mi povas nur diri, kaj ripeti, ke ĝi estas treege valora volumo por la Esperanto-movado en ĝia tuteco kaj por ĉiu unuopa esperantisto, kaj aldoni mian deziron, ke la unua eldono rapide elĉerpiĝu, kaj ke ĝin sekvu ankoraŭ multaj eldonoj kompletigaj."

Teo Jung

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 56 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- 17 numeroj jare
- Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- Duobla Kongresa numero
- Libera Tribuno de la legantoj
- Literatura kaj scienca suplementoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

Jarabono: 370 belgaj frankoj aŭ egalvaloro.

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: **Rue de la Reinette (Pippelingstraat) 13, boîte 28, Bruselo 1**
Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska